

Popola Ĉinio

人民中國報道

2 · 1963



Long-monto

Ĝardeno de Floroj

La 6,000 metrojn alta, neĝkovrata Julong-monto estas la ĉefa monto de Junling-montaro kuŝanta en la nordokcidenta parto de Junnan-provinco. Pro la granda varieco en alteco, la kreskaĵoj en tiu monto varias de tiuj de sekegaj stepoj ĝis tiuj de frostaj regionoj. Ekde la dua duono de la 19-a jarcento, tiu ĉi monto estas ofte vizitata de botanikistoj.

La monto estas kovrata de densaj arbaroj, en kiuj troviĝas multaj drog-plantoj kaj sovaĝaj floroj. Inter ili estas la azaleo, primolo, genciano, lilio, delfinio kaj *Meconopsis integrifolia*. Multaj specoj de azaleo, kelkaj kun alteco ĝis 7 metroj, troviĝas sur la tuta monto ĝis la alteco de 4,000 metroj. La skvamohava rododendro troviĝanta je la alteco de 4,000 metroj estas nur 4 centimetrojn alta. Antaŭ ol la azalefloroj velkiĝas, la multjara primolo jam plene disfloras vestante la monton per ĉarma mantelo de printempo kaj somero. La primolo estas unu el la kvar famaj floroj de Junnan-provinco. La aliaj tri estas la azaleo, kamelio kaj genciano. (Daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)

1. Pice-floroj
2. Primolo Purpura
3. Glacea Azaleo (*Rhododendron Chartophyllum*)



ĈIES OPINIO DEZIRATA

KAMPOJ de densaj sezamplantoj, kun malhele verdaj semuoj kaj prosperaj blankaj floretoj, liniis la vojon al la vilaĝo Ĉinghanĝuang en la sudo de Hebej-provinco. Sur vasta parcelo transe de unu el tiuj kampoj staras fortikaj maizoj du futojn altaj, kiuj estis plantitaj laŭ kutimo en tiuj ĉi lokoj, post la rikolto de la vintra tritiko. La aero estis ankoraŭ freŝa pro la pluvego pasinttaga kaj la radioj de la malfruposttagmeza suno milde karesis la ondantajn plantojn. Kiel bona espero por la rikolto, mi pensis.

“Verŝajne la grundo ĉi tie estas bona,” mi diris al la homo el la gubernia registaro, kiu min akompanis.

“Ne, ĝi estas tre malbona. Estas grandaj pecoj de alkala tero.” li respondis. “La esperigaj plantoj ĝuste pruvas, kion oni povas fari, kiam ĉiuj komunanoj zorgas pri la komuna bono.”

Li vidis ke mi estas konfuzita de lia respondo. “Vi komprenos kion tio signifas kiam ni alvenos tie,” li diris.

Kunveno de Rezentantoj

La 193 familioj de la vilaĝo Ĉinghanĝuang konsistigas unu el la produktbrigadoj de la Ĉuĝuang-a

Bona propono ricevas kuraĝigan rideton de prezidanto Vang Jenlin



Popola Komunumo en Dongguang-gubernio, kiu situas ĉe la Pekino-Hankou-a Fervojo. Tie la tero estas malalta kaj duono de la 2.640 muoj* en kultivado estas alkala grundo malfacile prilaborebla.

Kiam ni eniris la korton de la brigada oficejo, kunveno de reprezentantoj el la sep grupoj sub ĝia gvidado estis en vigla diskutado. La demando estas kiel plani la kamp-laboron pro la pasint-taga pluvo.

“Mia grupo nomis ĝin ‘bonvena pluvo’, ĉar ĝi venis ĝuste kiam ni finis sarkadon,” diris Teng Lienŝeng de la Grupo N-ro 2. Lia nigrebruna haŭto kaj profundaj sulketoj signis lin kiel spertan terkulturiston, kiu travivis multe da malfacilaĵoj. “La plej grava afero nun estas doni pli multe da sterko al la maizo,” li konkludis.

“Membroj de mia grupo diras ke ni devas kolekti kaj prepari tiom da sterko kiom ni povas,” alia pliaĝa kamparano proponis.

“Ni pensas ke ni devas ripari la vojon antaŭ ol transporti per-ĉare la sterkon,” interrompis iu alia.

“Ni ne povas atendi tiel longe. Ju pli frue ni ĝin veturigas, des pli bone. . .”

“Ni diskutis pri kolektado de sterko, sed ses laborpoentoj por unu ĉaroŝarĝo estas tro malalte. Oni ne interesiĝas pri la laboro.”

“Onklo Vang, kial vi ne alprenas nian metodon? Ni pagas varie laŭ la kvalito de la sterko kolektita: dek labor-poentoj por la plej bonkvalita kaj ses por la malbonkvalita. Nun grupanoj estas tre fervoraj en tiu laboro.” La parolanto estis dudekkelkjara virino nomata Ĝu Fengĝen, la plej juna el la ĉeestantoj.

La kunveno estis tute ne formala. Iafaĵe kelkaj homoj parolis samtempe, kaj neniu ilin haltigis. Membroj de la administra komitato aŭskultis atente aŭ atentigis pacience kiam la diskutado elglitis el la punkto. Vang Jenlin, la brigadestro, prezidanta la kunvenon, faris notojn en sia ruĝa libreto.

Kiam la kunveno finiĝis, mi komencis babili kun kelkaj el la partoprenintoj. Tiam mi demandis Vang Jenlin kiel li klarigas la fakton, ke la maizplantoj de lia brigado estis unu futon pli altaj ol tiu plantita de iliaj najbaroj. “Ĉi tiuj reprezentantoj estas multe respondecaj,” li respondis.

Vere interesis min lia respondo kaj mi decidis informiĝi pri la fakto. Kaj la jenon mi trovis.



“Ni bezonas pli multe da sterko por la maizo.”

Post la Rikolto de Tritiko

En malfrua junio tuj antaŭ kiam la tritiko estis falĉita, kunveno de grupaj reprezentantoj okazis por diskuti la principojn aplikotajn en distribuado kaj por plani kamplaboron post la rikoltado. La administra komitato proponis, ke tuj post falĉado de tritiko, la tero devas esti plugita por maizplantado, uzante la tir-brutojn kiel kutime por la laboro. Sed multaj membroj opiniis ke tio estos tro malrapida kaj proponis ke oni petu al la traktoro-stacio de la gubernio alsendi du traktorojn por la laboro. Ili devis prisemi teron duone tiom vastan kiom de la jaro pasinta, t.e. preskaŭ 800 muoj. Oni bezonus 15 tagojn por fini la plugadon per la tirbrutoj. Se pluvus, eĉ pli longa tempo estus bezonata. Ĉiu unutaga prokrasto en semado ja signifas malpliigon de produkto.

La brigadestroj hezitis akcepti la proponon, tiamante ke la pago al la traktoro-stacio, antaŭkalkulita je 600 juanoj por la tuta laboro, povus esti tro peza ŝarĝo por la malpli prosperaj grupoj. Sed grupaj reprezentantoj argumentis ke, se la plugadon oni povos fini antaŭ la veno de pluvoj, la maizo estos semita en ĝusta tempo kaj la produkto pliiĝos je 30 ĝinoj* po muo, aŭ sume je 24,000 ĝinoj. Se la maizo estus semita malfrue, tiam do la produkto facile malpliiĝos je 30 ĝinoj po muo. Krome, se la plugado estos farita per traktoro, la grupanoj povos uzi la tempon por kolekti kaj veturigi sterkon per la tir-brutoj samtempe.

Post zorga konsidero la administra komitato decidis akcepti la proponon kaj aranĝis monprunton de la banko por la grupoj, kiuj havis malfacilon pagi la koston.

La traktoroj poste venis kaj finis la laboron en kelkaj tagoj, ĝuste kiam ekpluvus. Tio pretigis bonan kondiĉon por plantado kaj la grupanoj amase eliris por semado. Jen estas la kaŭzo kial la maizplantoj tiel bone kreskis.

Lasu la Popolamason Paroli

La ĉefa problemo en la Ĉuĝuang-a Komunumo estas kiel venki alkalon en la grundo. La alta nivelo

de subtera akvo levas la alkalon al la surfaco, formante blankan kruston kaj mortigante la plantojn. Tradicie, la kamparanoj kultivis malgrandajn ebenajn kampojn, de kiuj ili periode forportis la supran teron por formi kampeĝojn, la leviĝinta alkalo baldaŭ estis tiel forprenita kaj malsupren trasorbiĝis kune kun la pluvakvo, kiu tiel lavis la teron.

En la printempo de 1960 kelkaj senspertaj junaj kamparanoj en la Ĉinghanguang-brigado, sen bone diskuti sian planon kun la maljunaj membroj kaj sen sufiĉa scio pri la graveco de drenado, decidis pligrandigi parton de la kampoj sub ilia mastrumado per forigo de la kampeĝoj. Rezultas, ke la kampoj pli altaj ne povis plu teni akvon por malhelpi la leviĝantan alkalon, kaj la pli malaltaj fariĝis trosaturitaj de akvo.

Unu el la maljunaj komunumanoj, Ĝoŭ Lianpi, kritikis tiun procedon, kaj detale klarigis sian sperton en kultivado de alkala tero. “La plej grava afero estas havi ebenajn kampojn,” li diris. “Se ni ne havas bonan drenan sistemon por grandaj kampoj, ni pli bone aranĝu ilin malgrandaj.” Lia opinio estis subtenita de multaj membroj, kaj la junaj organizantoj akceptis lian kritikon. La kampeĝoj estis restarigitaj kaj en 1961 bona rikolto de kotonono estis akirita sur 150 muoj da alkala tero.

La travivaĵo de 1960 igis la brigadestrojn konsiliĝi pli intime kaj aŭskulti pli atente, kion grupanoj parolis. Kunvenoj de grupaj reprezentantoj nun okazas regule po-trimonate, kaj specialaj diskutoj okazas rajtigite. La grupoj mem okazigas monatajn kunvenojn, kie multaj terkulturaj problemoj kaj demandoj koncernantaj viv-kondiĉojn de la membroj estas diskutitaj.

La kadroj trovis ke ju pli ili aŭskultis al la membroj, kaj ju pli serioze la decidoj faritaj en la kunvenoj de la reprezentantoj efektiviĝis, des pli fervore membroj esprimis sian opinion.

La Kukurboj

En junio 1961 estis pluvmanko, kiu minacis 20 muojn de kukurboj, plantitaj de la brigado sude de la vilaĝo. La sola akvo utiligebla estis en la proksima



“Kial ne pagi laŭ la kvalito de sterko kolektita?”

Fotoj de
Ĝang Juĉeng

lageto. Ĉe la speciala kunveno kunvokita por diskuti kiel venki la malfacilajn, multaj homoj subtenis la ideon fosi irigacian kanaleton de la lageto ĝis la kampoj. Vang Ĝanaŭ de Grupo N-ro 2 havis malsaman opinionon. "La nivelo de la lageto estas jam malalta," li diris. "Ni devus fosi kanaleton kvin futojn profundan. Tio bezonus 100 labor-tagojn! Pli bone alporti la akvon per siteloj."

Vang Jenlin decidis iri al la lageto kaj vidi ĉu tio estis vera. Post kiam li kaj aliaj membroj tion faris, la propono de Vang Ĝanaŭ estis akceptita. Multo do mono kaj laboro estis tiel ŝparita.

Mi forlasis la vilaĝon en la sekvinta tago. Sterkamasetoj jam aperis en la kampoj. La maljuna kamparano kun profundaj sulketoj portis sursultre vekton kun korboj svinge pendantaj ĉe ambaŭ finoj, kaj multaj aliaj sekvis lin. Mia dutaga restado donis al mi vivecan impreson pri tiu demokratia mastrumado kian plenumas la komunumoj en la vastaj kamparoj de Ĉinio.

* 1 muo = 1/15 hektaro

* 1 ĝino = 0.5 kg.

Huang Juĉeng*:

Projektado de Novtipaj Ŝpinteksejoj

JAM dekojn da jaroj mi laboris pri la teksindustrio. Sed ĉiufoje, kiam mi subskribis la projekton de iu nova fabriko, mi neniel povis deteni mian emocion kaj elkoran ĝojon: "Ho, la patrio havos alian novan ŝpinteksejon!"

En la arkivaj ŝrankoj de nia Projekta Instituto de Teksindustrio jam alte amasiĝis la projekto-libroj de teksfabrikoj. Ili montras al ni kiom da novaj ŝpinteksejoj jam konstruiĝis tra la tuta lando kaj kiel kreskadas la projekta povo de ŝpinteksejoj en Ĉinio. En la unuaj jaroj post la Liberiĝo, ni povis projekti nur la mezgradajn kotonajn ŝpinteksejojn, poste, iom post iom ni akiris projektadan sperton de prestinkturaj fabrikoj kaj fabrikoj de silkajo, lano, lino k.a., kaj fine, ankaŭ grandajn kombinumojn de ŝpinteksado kaj presad-tinkturado ni jam povas projekti.


Krome, ni projektis nemultajn teksfabrikojn ankaŭ por landoj de Azio, Afriko kaj Latin-ameriko. Mi persone gustumis la ekspluatadon de la entreprenoj de fremdlandaj kapitaloj antaŭ la Liberiĝo kaj nun mi sentas grandan ĝojon pro tio ke mi povas iom kontribui por la eksterlandaj amikoj liberigitaj el la katenoj de la imperiistoj.


Estas granda diferenco inter niaj nove projektitaj ŝpinteksejoj kaj tiuj de la malnova Ĉinio. Nun, pro la planita ekonomia konstruado, ni havas bonajn kondiĉojn por pli racie kaj pli science projekti ŝpinteksejojn. Tio estas mia plej profunda impresio en la multjara laborado super projektado de teksfabrikoj.

Antaŭ la Liberiĝo, en la ŝpinteksejoj entreprenataj aŭ de naciaj kapitalistoj aŭ de imperiistoj, ĉie oni trovis neraciajn aranĝojn. Ekzemple, la senordeco en la aranĝo de maŝinoj, la nekonvena larĝeco de la trairejoj maloportuna por manipulado; en iuj laborejoj la tuboj kaj dratoj estis senorde instalitaj

* Ĉefinĝeniero de la Projekta Instituto de la Ministerio de Teksindustrio.

La Unua Lanŝpinejo en Huhehaŭte, ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio





Unu el la laborejoj de la 2-a Ŝtata Kotonŝpinejo de Pekino, fabriko ekipita per maŝinoj kaj instalaĵoj enlande produktitaj.

Nun en nia Projekta Instituto de Tekstindustrio, ni organizis, en laŭplana kunlaborado, diversajn teknikistojn de teknologio, civila konstruo, ventolado, elektro, drenado. Tial niaj projektoj de ŝpinteksejoj estas totalecaj. Dum la konstruado ĉio estis aranĝata laŭ tia projekto kaj ĉiu laboro en la konstruado estis farata bonorde, tute diferencas de tiu en la pasinteco. La nove

kun malplaĉa aspekto kaj malhelpo al bona lumigo de la laborejoj. Ankaŭ la dependaj konstruaĵoj estis dislokitaj senkonsidere. En iu ŝpinteksejo, la kaldronejo estis konstruita tuj apud la kotonpurigejo, kio ja povas facile kaŭzi brulegon.

Kiel teknikisto mi tre ĉagreniĝis pro la menciitaj malraciaĵoj. Sed mi estis tute senpova por ion fari. Tiam la projektado de fabrikoj en nia lando estis preskaŭ tute monopoligita de la profitĉasaj fremdlandaj kompanioj. La projekto de la maŝininstalado de la fabrikoj estis ofte pretigita de la fremdlandaj fabrikoj de tiuj instalaĵoj, la domkonstruo de la fabrikoj estis planitaj de ordinara arkitekto laŭ siaj nekompletaj materialoj. La elektra drataro, la varmoprovizo, akvodonado kaj ventolado estis aparte aldonitaj de diversaj mekanikistoj. Ofte en la konstruado oni finkonstruis unue la domojn kaj poste aranĝis la internan ekipaĵon kaj por instalati maŝinojn, tubojn kaj dratojn, oni ne povis ne depreni ion tie kaj aldoni ion ĉi tie, fari tie kaj tie kavojn aŭ truojn kaj el tio rezultis diversaj neraciaĵoj.

konstruitaj ŝpinteksejoj de nia lando ĝenerale konformas al la specialaj postuloj de la ŝpinteksa produktado. La trairejoj por diversaj specaj ŝpinteksmasinoj estas en ĝusta larĝeco, oportuna por manipulado. La endomaj trafikaj linioj estas racie aranĝitaj kaj multe ŝparigas fizikan laboron. En la laborejoj la lumigado estas bona kaj preskaŭ en ĉiu angulo kaj por ĉiu maŝino estas taŭga lumigo. La perfekta ventola sistemo en la fabrikoj garantias al ĉiu laborejo konvenajn varmecon, sekecon kaj rapidecon de la aerfluo, kio ege influas la kvaliton de la ŝpinaĵoj kaj teksaĵoj kaj la sanon de la laboristoj. En la laborejoj la tuboj kaj dratoj estas instalitaj laŭ racia ordo. Tiaj fabrikaj projektoj ebligas fari kaj la instaladon kaj la funkciadon bonordaj kio estis ne realigebla antaŭ la Liberiĝo.

Ni fieras ke la fabrikoj, kiujn ni projektis, estas tute ekipitaj per ŝpinteksaĵoj maŝinoj kaj diversaj helpaj instalaĵoj produktitaj de nia lando. Antaŭ la Liberiĝo, nia lando povis nur riparadi kaj munti ŝpinteksaĵojn maŝinojn. Nia fabrikado de teksmaŝinoj estas nove starigita, tial ĝi ne estas katenita de la malnovaj formoj kaj povas lerni la sukcesajn spertojn de diversaj landoj tra la mondo, kaj krei siajn kompare bonajn tipojn laŭ la realaj enlandaj kondiĉoj.

Kiel plene ekspluati la kapablon de tiuj ekipaĵoj por ke ili donu altkvalitajn produktaĵojn estas la problemo kiun ni, la projektistoj devas bone solvi. Ekzemple, la uzataj fibroj por ŝpinteksaĵo estas tre sentemaj pri varmecon kaj malseko, kaj iliaj ŝanĝiĝoj super la difinita normo, kaŭzas pliigon de fadenrompoj kaj de ŝvebanta kotonlanugo, kaj multe influas la kvanton kaj la kvaliton de la produkto eĉ se la teksmaŝino estas la plej bonkvalita.

Ni, kiuj laboris en ŝpinteksejoj antaŭ la Liberiĝo, tre ĉagreniĝis pro la problemo. Tiam en la laborejoj ne troviĝis perfektaj instalaĵoj de aer-reguligado. Kiam la vetero ŝanĝiĝis, la laborkondiĉo en la labo-

(daŭrigo de p. 72)

kaprice ŝanĝiĝas antaŭ vi; kiel grandiozas la naturo, kiu malfermas al vi la animfenestron.

En via koro estas kurteno de pluvo, gazo de nebulo, varmo de suno, ekbriloj de fulmo; ili muzikas en via koro kvazaŭ klavaro.

Eĉ minuton vi ne trankviliĝas, via mieno ŝanĝiĝas kiel la vetero mem. Kiam la verdajn foliojn iom invadas velka flavo, vi ekamas la nubon; kiam la tero malsekiĝas ĝis apero de ŝaŭmoj, vi sopiras al la suno.

Kaj ĉiuj ĵetas al vi dankemajn rigardojn, kiam sub la monto ondiĝas oraj spikoj en vento.

rejoj ankaŭ sekve ŝanĝiĝis. Ekzemple en somero, la plej alta temperaturo atingis 40° C ĉe kio laboristoj ofte falis svene, kaj la produktado estis en tre malstabila stato. Nun, en la nove projektitaj fabrikoj estas ĝenerale instalitaj la perfektaj sistemoj de aerreguligado, kiuj efike konservas la konvenan varmecon kaj malsekecon en la laborejoj kaj ĉiam garantias la normalajn laborkondiĉojn. Kaj nun la laboristoj laŭdas la laborejojn per jenaj vortoj: "Estas varme en vintro, malvarme en somero, kaj ĉiam ilin regas printempo."

La ŝvebanta kotonlanugo en ŝpinteksejo rekte influas la kvaliton de la produktaĵoj kaj grave malutilas al la spirorgano de la laboristoj kaj oficistoj. En la pasinteco multe da laboristoj en ŝpinteksejoj suferis ftizon. La malnovaj ŝpinteksejoj ĝenerale ne posedis instalaĵojn de perfekta aerfiltra sistemo kontraŭ lanugoj, sed nur havis tiun de elpuŝado de kotonlanugo. Rezultiĝis ke tre malpure estis ekster la laborejoj kaj la elpuŝita lanugo povis esti reportita de la freŝa aero en la laborejon kaj denove influu la internan purecon. Nun la nove projektitaj ŝpinteksejoj jam havas instalaĵojn por ensorbi la ŝvebantajn kotonlanugerojn kaj fari la aeron tre pura en kaj ekster la laborejoj.

Antaŭe, enveninte fabrikojn de presado kaj tinkturado oni tuj vidis densan nebulon aŭ sentis naŭzan vaporon, kaj krome odoraĉis en ili acido kaj kloro sufokaj kaj blindigaj. Sed en la nunaj fabrikoj de presado kaj tinkturado estas tute alia stato. Ĉirkaŭ la maŝinoj, kiuj ellasas varmon kaj vaporon, estas instalitaj perfektaj vitraj kovriloj, kiuj tion malebligas, kaj ebligas nin klare vidi la iradon de la maŝinoj interne de la vitraĵo. Ankaŭ la perfekta sistemo de la ventolado kaj la plibonigo de la teknologia procedo helpas minimumigi la odorojn de ĥemiaĵoj.

Antaŭ la Liberiĝo, en la ŝpinteksejoj, la laboristojn minacadis danĝeroj de kripliĝo pro neglekto de laborsekurigo. Kiom da homoj vundis la rapide kurantaj rimenoj kaj turniĝantaj nudaj rultuboj kaj dentradoj. Sed nun por ĉiu danĝera maŝinparto oni instalas protektan kovrilon. Estas oftaj projektoj ke dum funkciado de la maŝino, la kovrilo ne estas malfermebla kaj kiam la kovrilo estas malfermita, la maŝino estas ne funkciigebla; aŭ se oni malfermas la kovrilon, la maŝino tuj ĉesas labori. Tiamaniere oni multe reduktis la akcidentojn kaj trankviligis la laboristojn en la produktado.

Alia grava plibonigo de la labora kondiĉo estas plia mekanikigo de la transportado. Antaŭe la tekslaboristoj ĝibiĝis ne maljunaj pro portado de pezajoj.

Sed nun ĉiuj ŝpinteksejoj jam ĝenerale uzas facilmovajn arganojn kaj akumulatorajn ĉarojn.

Kiam ni faras projekton de ŝpinteksejo, ni tre alte taksas la utiligon de lokaj materialoj. Antaŭe niaj ŝpinteksejoj ne nur dependis de eksterlandaj maŝinoj, sed eĉ de la eksterlanda koton. Tio ja estis fenomeno de kolonia ekonomio. Nun en la projektado de enlandaj ŝpinteksejoj oni emfazas konformiĝon al la lokaj kondiĉoj kaj utiligon de la lokaj materialoj. Kaj ankaŭ en projektado de ŝpinteksejoj por alilandoj ni laŭeble konsideras la utiligon de iliaj propraj krudaj materialoj. Ekzemple kiam ni projektis ŝpinteksejon por Birmo, ni modifis nian projekton de la maŝinoj laŭ la karakteroj de la birma koton. Ni ankaŭ ŝpinis eksperimente la speciale importitan kotonon el Birmo per niaj maŝinoj. Laŭ la rezulto de la eksperimento ni plue modifis la maŝinprojekton por ke ĝi konformu al la karakteroj de la birma koton. Kaj ni speciale projektis laŭ tio ŝpinteksajn maŝinojn por produktado per la birmaj krudmaterialoj, tiel ke ilia ŝpinteksejo akiris evidentan ekonomian efikon baldaŭ post la inaŭguro de la fabriko por produktado.

La grand skala utiligo de lokaj konstruaj materialoj povas malaltigi la konstruan koston. Krom konstruajn materialojn por konstrui ŝpinteksejon oni bezonas ankaŭ grandan kvanton da materialoj por varmokonservado kaj plankumado. Estas malfacile trovi konvenan fonton de tiuj ĉi materialoj. Por ke la investoj ne tro multe grandiĝu, ni projektistoj ofte klopodas per ĉiuj rimedoj utiligi lokajn materialojn sub la premo garantii la efikon de uzado. Kaj la utiligo de la lokaj hejtajoj estas ankaŭ unu el la gravaj problemoj konsiderindaj.

Kiam mi havas okazon viziti teksfabrikojn projektitajn de nia Instituto, neniam mi preterlasis la ŝancon kolekti opiniojn kaj konsilojn de laboristoj kaj teknikistoj, esperante trovi sugeston el la kritikoj por pliperfektigi nian projektan laboron.

En la Ŝpinteksejo de Kamboĝo-Ĉinia Amikeco, kamboĝa fabriko konstruita per la helpo de Ĉinio, ĉina ŝpinistino Vang Hiuĝen (la 2-a de maldekstre) lernigas sian sperton al kamboĝaj ŝpinistinoj.

Fotoj de Hin Hua



Ŝi Jimin:

Vojaĝnotoj pri Malio


LA seka kaj varmega klimato de Okcidenta Afriko estis vere malagraba al ni ĵusalvenintoj. Sed, la densaj bluaj arbaroj, la altaj arbegoj, la tutaj senvelkaj florarboj, kaj la rondaj domoj kun pintaj tegmentoj konstruitaj el tero sub la arboj . . . ĉiuj aspektis tiel originale kaj impresis tiel freŝe ke oni neniam povas ilin forgesi!

En Malio, kio frape nin impresis neforgeseble, tamen estas la fervoro de la popolo en la batalo por sendependeco kaj konstruado de sia patrujo. Dum la vizito ni akiris pli profundan konon pri la krimoj de la imperiisma kolonia regado en tiu lando.

Antaŭ du jaroj, la Respubliko de Malio ekstaris kiel sendependa lando en la centro de la kontinento de Okcidenta Afriko. Ĝi havas areon de 1,204,000 kvadrataj kilometroj kaj loĝantaron de ĉirkaŭ 4,000,000. Fluas sur ĝia tero la riveroj Nigero kaj Senegalo. Sur la bordoj de la du

Vendostando de metiartaĵoj en Bamako

Foto de Meng Hiankjuan



Foiro de fajencaĵoj en Mopti

Foto de Meng Hiankjuan

riveroj estas multaj naturaj riĉfontoj, abunde kreskas kotono, arakido kaj rizo. Nigero produktas grandan kvanton da fiŝoj. Iuj fiŝoj pezas po dekojn da kilogramoj. Plejparte la fiŝoj estas prilaboritaj loka kaj tuj eksportataj eksterlanden.

En la baseno de ambaŭ riveroj estas sufiĉe da akvo kaj herboj, kaj prosperas tie bestobredado. Laŭ statistiko la tuta lando bredas tri ŝafojn kaj unu bovon por ĉiu loĝanto. Kiam ni rapidis en aŭtomobilo sur ŝoseo, ni vidis ĉie gregojn de ŝafoj kaj bovoj, ĉu sur montdeklivoj aŭ ebenajoj, ĉu en arbaroj aŭ sur herbejoj.

La malia popolo havas nacian kulturon de longa tradicio. Kiel ekzemple, ĉu plenaĝuloj aŭ dekelkjaraj infanoj, ĉiuj povscias danci. Ni vidis en Malio multajn specojn de dancoj.

Pluraj el ili estas vaste konataj kaj distingiĝas per siaj karakterizaj de forteco, vigleco kaj kortuŝivo.

Ekde la kvindekaj jaroj en la deknaŭa jarcento, tiu ĉi lando kun ĝia laborema popolo kaj fekunda tero estis grandskale invadita de francaj koloniistoj, kaj perdis sian sendependecon en 1904. Sekve de tio la malia popolo suferis kruelan subpremon kaj ekspluaton sub la kolonia regado de imperiismo kaj dum longa periodo vivis ekstreme mizere. Sed la malianoj estas brava popolo kun longa tradicio de batalo por libereco. Dum la lastaj cent jaroj, ili neniam ĉesis fari furiozan batalon kaj reziston kontraŭ la koloniistoj, kaj fine sukcesis establi la Respublikon de Malio la 22-an de septembro, 1960. Post la fondiĝo de la Respubliko, la kolonia armeo ankoraŭ klopodis restadi en la lando. Tamen, pro la firma batalo de la popolo, ili devis sin retiri el ĝi. Mi vidis ke unu kazerno de la kolonia armeo jam fariĝis sidejo de la aviadkompanio de Malio, kaj unu loĝdomo

de altrangaj oficiroj de la kolonia armeo estas uzata kiel gastejo por akcepti eksterlandajn amikojn.

Kiam ni petis por viziti iun hospitalon, fiere diris al ni nia malia amiko, oficisto de la Ministrejo de Informado, kiu nin akompanis: "Antaŭe, ĉiuj hospitaloj apartenis al blankuloj kaj ne enlasis malianojn. Nun, ne nur la hospitaloj apartenas al ni, sed ankaŭ iliaj direktoroj kaj kuracistoj ĉiuj estas malianoj. Ni jam sendependiĝis, kaj ni nun estas la mastroj de nia propra lando." Li ankaŭ informis nin ke ĉe la centro de Bamako antaŭe staris bronza statuo de Borgnis-Desbordes, la franca kolonia gubernatoro, kiu plej frue invadis Bamakon kaj buĉis la popolon, kaj lastatempe tiu statuo estis faligita, simbolante





Foto de Ĉen Kinjuan

la destinton de koloniismo kaj ankaŭ la decidemon de la malia popolo en sia batalo kontraŭ la koloniistoj kaj por la prospero kaj sendependeco de sia patrujo.

Post la sendependiĝo de Malio, la koloniistoj ankoraŭ provas utiligi ĝian ekonomian malfortecon por sufoki la junan respublikon per ekonomia blo-

kado. Sed la malianoj ne submetiĝis, ili faras ĉion por konstrui sian landon spitante multajn malfacilojn. Por likvidi la postrestintajn ekonomiajn influojn de koloniismo kaj sin liberigi de la dependeco al koloniismaj landoj, la malia registaro unue establis Ŝtatan Oficejon de Mon-transsendo kaj Popolan Bankon, kaj ankaŭ fondis Importan kaj Eksportan Kompanion de Malio, por efektiviigi rigoran kontrolon super la enlandaj kaj internaciaj komerco kaj financo. Aliflanke, en la ekonomia konstruado, Malio estas plenumanta la unuan kvinjaran planon. Por pliiĝi la produkton de greno, la malia registaro prenis paŝojn por kultur-ebligigi virgan teron kaj ekspansii semitan areon. En unu el la eksperimentaj farmoj de Malio, ni vidis ke ĉina specialisto studas kune kun la maliaj agrikulturaj teknikistoj la metodon de vastarea plantado de sukerkanoj. Proksime de tiu eksperimenta farmo, maliaj laboristoj semas tearbojn kune kun ĉina specialisto de teplantado. La ĉinaj specialistoj ne timas la varmegan sunbrilon kaj intime kunlaboras kun maliaj laboristoj kvazaŭ membroj de sama familio. Ĉar ili havas komunan volon labori konsciencie por ke tearboj floru en Malio. Mi kredas ke la tearboj kreskos kaj prosperos ĉie sur la kampoj, kiel la amikeco inter la ĉina kaj malia popoloj.

Parolante pri la kondiĉoj de konstruado de sia lando, la malianoj ĉiuj diris samvoĉe: "La francaj koloniistoj postlasis al ni nenion krom malriĉeco kaj postrestinteco. Ni devas konstrui prosperan, riĉan kaj fortan Malion per niaj propraj manoj, rekonstruante ĉion de la komenco."



Maliaj laboristoj fabrikas terkulturajn instrumentojn. Foto de Meng Hiankjuan



Maliaj milicianoj serioze sin ekzercas por fariĝi efikaj defendantoj de la juna respubliko. Foto de Meng Hiankjuan

Efektive, dum nia restado en Malio ni povis vidi en ĉiuj lokoj personojn partoprenantajn volontule diversajn laborojn: iuj konstruis ŝoseon, aliaj fosis kanaleton, kaj ankoraŭ aliaj konstruis domojn kaj lernejojn. En la konstrubazoj, virinoj organizis sin en trupoj por livero de trinkakvo kaj agitado, kaj prezentis artajn ludojn por stimuli laborfervoron. En la fervora laborado kaj gaja kantado, la malianoj elmontris sian ardan deziron rapide konstrui sian patrujon.

En iu serena mateno, ni ĉeestis la inaŭguradon de iu elementa lernejo. La urbestro diris al ni ke la lernejo estis konstruita per volontulaj laboroj de la loĝantoj. Estas tute kompreneblaj liaj ĝojego kaj fiero,



En vespera kurso de Bamako, maljunulino pli-ol-50-jara respondas dum leciono al la kurso-gvidanto.
Foto de Meng Hiankjuan

kun kiuj li diris tion. La ĝojhumoro de la infanoj kiuj eniris la lernejon tiun tagon, klare esprimiĝis en iliaj nigraj brilaj okuloj. Ili ĝoje ek-sidis en la tute novaj lernoĉambroj, kie edukigōs la nova generacio de la Respubliko.

Kiel sian plej gravan taskon la malia popolo hodiaŭ konsideras

la konkeron de ĉiuj malfaciloj kaj disrompon de la blokado kaj ĥintrigo de imperiismo, por sekurigi kaj konstrui sian landon sendependiĝintan. En Bamako kaj multaj aliaj urboj, oni povas vidi ke maliaj gejunuloj ekzercas sin serioze kun pafilo sur la ŝultro. Ili estas ĉiam singardaj kontraŭ la reveno de imperiismo, kaj pretas respondi al la sankta voko de sia patrujo en ĉiu momento. El la stariĝinta malia popolo ni povas vidi ke la malia popolo kaj ankaŭ la tuta popolo de Afriko estas nekonkereblaj. Ni firme kredas ke la Respubliko de Malio kaj ĝia popolo certe venkos siajn malfacilojn kaj sukcese konstruos la landon riĉa, forta kaj bela.

Liu Gjun:

EN BESTO-HOSPITALO

EN la Sudĉinia Agronomia Instituto estas interesa hospitalo, kies "pacientoj" ne estas homoj, sed bovoj, ĉevaloj, porkoj, hundoj, kokoj, anasoj, kunikloj, katoj k. t. p. Iam eĉ alvenis tigro, elefanto, cervo kaj aliaj kuriozaj bestoj kaj birdoj por esti kuracataj. Besto-hospitalo de tia amplekso ekzistas en Ĉinio nur post la Liberiĝo.

Neordinara Kuracarto

Kiam ni venis vizite al tiu ĉi hospitalo, la veterinaroj estis farantaj ostariparan operacion al granda bovo, kiu dum lukto kun alia bovo falis de alte kaj rompis al si la metatarson de la dekstra antaŭpiedo. Ĝia mastro devis sendi ĝin al la besto-hospitalo por kuraco.

Estis malfacile operaci bovon. Starante antaŭ la operacia stablo, la mamuta besto tute ne obeis al la veterinaroj. Oni devis ligi ĝin sur la operacia stablo per dikaj ŝnuroj kun helpo de dekkel-

kaj homoj. Kiam la ĉef-kuracisto Vang Ŝuĉeng donis signon por anestezo, 6-7 'studento-kuracistoj' (kvar-jaraj studentoj de la bestobreda kaj veterinara fakultato) forte premis la beston, dum alia pikis en ĝian kolovejnon per injektilo. La kvanto de injektaĵo estis miriga: 700 kubaj centimetroj. Kiam la bovo senkonsciigis, docento Vang Ŝuĉeng lerte frotis kaj knedis ĝian vunditan parton, reĝustigis la pozicion de la rompita osto kaj faris aliajn necesajn procedojn. Pli ol du horoj pasis antaŭ ol la operacio estis finita. Docento Vang forviŝis la ŝviton de sur sia frunto kaj diris al ni:

"Ĝia metatarso estas reĝustigita. Post kelktempa ripozo kaj kuraco, ĝi povos reiri al kultiva laboro." Estis videble, kia ĝojo plenigis la koron de la veterinaro.

Laŭ terapiro, la medikamento estas same aplikebla al bestoj kiel al homoj. Tamen la homaj pacientoj povas kunlabori kun la kuracisto, dum la malsanaj bestoj

ne. Ili nek povas paroli, nek obeas. Malgraŭ tio, niaj veterinaroj ĉiurimede klopodas fari ĝustan diagnozon kaj apliki efikajn medikamentojn. Ili detale pridemandas la mastron de la malsana besto pri ĝia malsano kaj zorgeme mezuras la temperaturon, aŭskultesploras, kaj faras aliajn ekzamenojn per diversaj specialaj metodoj. Ekzemple, por ekzameni porkojn per radioskopo la veterinaroj inventis ledan fiksilon, kiu povas teni la beston senmovi. Eĉ ludema simio de zoo-ĝardeno kviete ricevis radio-ekzamenon en tia fiksililo. Dank' al komuna klopodo bestokuracistoj de ĉi tiu hospitalo sukcesis kuraci hipopotamon de enterito kaj operaciis tigron pri furunko.

Savantoj de Malsanaj Bestoj

Kondukate de veterinaro Su Kjuanceng, ni rondiris en la tuta hospitalo. Same kiel en hospitalo por homoj, ankaŭ ĉi tie troviĝas sekcio por eksteraj pacientoj kaj apoteko, flegejoj k. t. p. kaj la

kuracistoj ankaŭ eliras por fari kuracojn laŭ invito. En la fako por bovoj kaj ĉevaloj, ni vidis tie sep aŭ ok 'malsanulojn'. La diversspecaj laboratorioj por patologia anatomio, por internaj malsanoj, infektaj malsanoj, parazitologio, radio-terapiejo, ĥirurgia operaciejo k.a. ekipaĵoj de la Sudĉinia Agronomia Instituto estas je la dispono de la bestohospitalo. Profesoroj de la instituto ofte venas ĉi tien kaj mem faras kuracadon al la bestoj. Iutempe, kombina kuracado de ĉina tradicia kaj okcidenta medicinoj estis aplikata kaj resanigis multe da malsanaj bestoj. Ekde 1957, miloj da malsanaj bestoj estis kuracitaj en ĉi tiu hospitalo kaj denove iris al laboro.

Kompreneble, kiel suborganizo de la Sudĉinia Agronomia Instituto ĉi tiu besto-hospitalo servas ne nur por kuracado, sed ankaŭ por instruado kaj scienca esplorado. Pere de kuraco al malsanaj bestoj, la sciencaj laborantoj studas teorion de veterinara scienco kaj resumas siajn spertojn en terapio por ilin disvastigi. Foje, iu malsana porko sinturnadis sur la tero kaj poste falis paraliziginta. Tio estis malofta kazo. Profesoro Kuang Jonglu, estro de la bestobreda kaj veterinara fakultato kaj la kandidatoj-



Operacio al tigro

profesoroj Ou Ŝouŝu kaj Maŭ Hongfu tuj iris al la okazejo por ekzameno kaj post tio ili revenis al la hospitalo kun la malsana porko, faris multfojajn ekzamenojn kaj studon. Iom da sango de la malsana porko estis elprenita injektita al kuniklo por provo. Post 60 horoj la kuniklo sentis ekstreman jukon kaj freneze mordis sian haŭton. Samtempe ĝia temperaturo altiĝis kaj ĝi mortis post nur kelkaj horoj. Multaj ekzamenoj kaj eksperimentoj estis faritaj de la profesoroj. La provaj injektoj de ĉi tiu viruso al aliaj bestoj kaj birdoj nombris pli ol 120 fojojn. Finfine konfirmiĝis, ke la viruso estas tiu de pseŭdorabio. La profesoroj ankaŭ trovis rimedojn por preventi ĉi tiun danĝeran malsanon.

Penadoj por Servi al Agrikulturo

Ĉiuj laborantoj en la bestohospitalo scias, ke grava estas la tasko servi al agrikultura produktado. Kiam ajn la kamparaj komunumoj sendas al la hospitalo malsanajn bestojn, ili ricevas tujan helpon. La veterinaroj ofte vizitas la komunumojn por fari kuracon tie. Antaŭ nelonge la hospitalo sinsekve akceptis malsanajn ĉevalojn el diversaj

lokoj, kiuj suferis de ŝveliĝo de la makzeloj kaj skapoloj, tromalvasteco de la pelvo kaj vomo de fojno. Tio estas tipaj simptomoj de rakito*. Veterinaroj Su Kjuanceng kaj Ju Ĝe iris al la ĉevalbredaĵoj kaj trovis, ke la bredistoj ne sciis doni variajn nutraĵojn al la ĉevaloj. Ili donis ĉefe branon kaj malofte herban kaj mineralan nutraĵojn. Mankis al tiuj ĉevaloj kalcio kaj vitaminoj. La veterinaroj proponis ke al la ĉevaloj estu donita kalcio-laktato



Ekzameno pri porko

kaj ĉiutage konketoj aŭ kalko estu aldonitaj al ilia regula manĝo, kaj pli multe da verdaj herboj estu manĝigataj. Post plibonigo de la nutraĵoj, malpliigis kazoj de rakito ĉe la ĉevaloj.

La veterinaroj ofte faras kuracviziton dum meznokto en vento kaj pluvo. Foje, kiam kandidato-profesoro Je Haŭ vespermanĝis, oni subite lin vokis al farmejo kie bovino estis en malfacila akuŝo. Li tuj formetis la bovlon kaj tien veturis kune kun tri asistantoj. Ili trovis, ke la bovino, akuŝanta jam du tagojn estis en danĝero, ĉar la fetoj jam mortis kaj eĉ putriĝis interne de la utero kiu ellasadis sangon kaj puson. La veterinaro decidis fari tujan operacion, sed la bovino jam tiel laciĝis, ke ĝi falis teren. Estis ege malfacile fari la operacion. La veterinaroj devis kuŝiĝi apud la bovino kaj elprenis la mortan feton pecon post peco. Kvankam iliajn vestojn puse kaj sango makulis kaj koto malpurigis, tamen la kvar veterinaroj persistis en sia laboro. Kiam unu ne plu povis elteni, alia tuj daŭrigis. Ili laboris alterne ĝis la bovino estis fine savita. Tiam la koko jam ekkriis kaj en la oriento jam aperis la unuaj lumstrioj.

* Malsano ĝenerale kaŭzita de subnutrado kaj karakterizata de moliĝo kaj deformiĝo de la ostoj.

SURMARAJ "KAMPOJ"

Kingdaŭ estas bela apudmara urbo situanta ĉe Giaŭĝoŭ-golfo. Ĝia fekundiga malpura akvo fluadas en la maron kaj kreas tie produktivajn surmarajn "kampojn", en kiuj kreskas plenprosperaj laminarioj*.

Kiel Kreskas la Laminarioj?

La plantado de laminario en libera maro tute diferencas de kulturado de ordinara plantado sur la tero. La landaj kreskaĵoj enradikiĝas firme en la teron, kaj iliaj folioj sin direktas al lumo; la laminarioj tamen kreskas ĝuste laŭ mala maniero — iliaj falsaj radikoj sin levas supren kaj fiksas sur ŝnuroj flosigitaj sur la marsurfaco, kaj iliaj longaj rubandsimilaj folioj sin etendas malsupren. Por kulturi laminariojn oni uzas ne agrikulturajn instrumentojn, kiaj plugilo, falĉilo ktp., sed di-

kajn ŝnurojn, kiujn oni flosigas per bambutrunkoj aŭ malplenaj vitraj globoj. La finojn de la ŝnuroj oni fiksas sur lignaj fostoj, ke ili ne fordrivu. Sur la maro apud Kingdaŭ oni povas vidi kolonarojn de tiaj bambuaj trunkoj kaj vitraj globoj bonorde vicigitaj, kvazaŭ bedaroj sur kampoj. Jen tio estas la "hejmo" de la laminarioj. Por faciligi la kalkuladon de produktaj laboroj, oni dividis la kulturatan marsurfakon en tri distriktoj, laŭ la proksimeco al la bordo, nome la internan, mezan kaj eksteran, kiuj estas ankoraŭ dividitaj en multaj subunuoj. En ĉiu distrikto estas aparta kolonaro de bambuaj trunkoj destinita por esti "hejmo" de malgrandaj laminarioj, kiuj poste estas transportitaj al la ceteraj grandnombraj kolonaroj por tie kreski ĝis rikolto. Tio tre similas al kulturado de rizplantoj, kies plantidoj estas same aparte kreskigitaj antaŭ transplantado.

Laborplena Estas la Tuta Jaro

La kulturistoj de laminarioj estas okupitaj en ĉiuj kvarsezonoj. Dum la tuta jaro ili diligentas en la surmaraj "kampoj".

La vintro, dum kiu sur la maro aperas maldika tavolo da glacio, estas ĝuste la grava tempo por kreskigo de junaj laminarioj. La laboristoj portas sur si longajn kaŭcukajn botojn, vattajn ŝtrumpojn kaj vestojn, peltan superveston kaj, surkape, peltan ĉapon kun orekrovriiloj, kaj ĉiutage laboras sur maro en boatoj kun

hejtata forno. Apogante sin sur la boatflanko, la laboristoj forbrosas la sovaĝajn algojn. La laboro postulas grandan zorgemon kaj atenton. Alie tiuj algoj forrabos la vivgrundon de la junaj laminarioj. Post prisarko de peco da ŝnuro ili devas revarmigi siajn manojn ĉe la forno.

Marto kaj aprilo estas la tempo por kreskado de la laminarioj. Dum senventaj tagoj, la maro estas tiel kvietaj kaj klara, kiel lageto. La laminariaj rubandoj pendantaj de ŝnurvicoj flirtas en la akvo, laŭ la ritmo de la milda ondado de la maro, kaj diverskoloraj fiŝoj naĝas amase inter ili tien kaj reen — tre bela estas la vidaĵo.

Tamen, ventegoj ofte faras damaĝon al ilia kreskado, tiam la laboristoj devas batali kontraŭ la ventoj kaj ondoj kuraĝe, sagace kaj sentime al malfaciloj kaj penado. Post la atako de ventego, la surmaraj "kampoj" ne restas plu tiel bonordaj kiel antaŭe: unu ŝnuro implikiĝas kun alia, laminariaj rubandoj ĥaose volvas bambutrunkojn, kaj iuj vitrogloboj estas forblovitaj. La laboristoj devas zorge kaj atente reordigi la implikitajn kunvolviĝintajn laminariojn, kunligi la rompigitajn ŝnurojn, ripari la flosilojn kaj kelkfoje labori eĉ subakve. La agitado de ventoj kaj ondoj ofte levas supren la sablerojn kaj kotajon de la marfundo, tiel ke tiuj krocigas sur la surfaco de laminariaj rubandoj malhelpante al ili la prilumiĝon kaj spiradon. Tiam la laboristoj devas svingpurigi ilin.

Post la okupoplena rikolta sezono en la varmaj someraj tagoj tuj venas la tempo por prepari

* *Laminaria angustata*.

Rikoltado de laminarioj en la surmaraj "kampoj" de Ljuda-a Marprodukta Kulturrejo. Foto de Gaŭ Guokjuan





Gaŭ Gikun, sperta kulturisto de laminario kontrolas kiel kreskas la plantaĵoj.

Foto de Miaŭ Ming

novan provizon da ŝnuroj, bambutrunkoj, vitrogloboj kaj aliaj objektoj, ĉar denove alproksimiĝas la sezono por semado de laminarioj.

Riĉa Rikolto

En somero brilas oleo la kafokoloraj laminarirubandoj kaj blankiĝis iuj el iliaj finoĵ, tio montras, ke la laminarioj estas jam maturaj, kaj devas esti rikoltitaj.

La rikoltado, same kiel tiu de grenoj ĉe terkulturistoj, devas esti farita ĝustatempe, ĉar tro frua aŭ tro malfrua rikolto malpliigas la produktkvanton. Dum la laborplenaj tagoj de rikoltado oni intense aktivigas ambaŭ sur la tero kaj sur la maro. Surborde oni sin okupas pri alportado de salo kaj pretigo de tenejoj, pri riparado de boatoj, kiuj estas organizitaj en rikoltaj boattrupoj laŭ diversaj produktaj brigadoj respektive. La veterraportisto kun granda atentemo kaptadas ĉiujn anoncojn pri la vetero disaŭdigotajn de la Mara Observatorio.

En krepuskiĝo, kiam la matena nebulo ankoraŭ ne malaperis sur la tute kvieta maro, jam tie kaj ĉi tie punktas multaj veloj sur la diafanaj ondoj—jen aktivigas la rikoltaj boatoj de diversaj produktaj brigadoj sur la maraj “kampoj”. Tuj post alfikso de la boatoj la laboristoj komencas la rikoltadon svingante siajn fortajn brakojn. Ili forte eltiras el la akvo la ŝnurojn kun laminarioj unu post alia sur la boatojn. Ĉiu ŝnuro kun dikaj kaj longaj laminarioj minimume pezas 20 — 25 kilogramojn. Kelkan tempon poste, sur la maro ekaperas multaj malrapide naĝantaj “montetoj”—jen boatoj plene ŝarĝitaj

per laminarioj revenas al la bordo. Tuj deŝarĝite, la rikoltboatoj denove rapidas senripoze al la maraj “kampoj”. Nun surborduloj komencas detranĉi la monte amasigitajn laminariojn de la ŝnuroj, kaj sternas ilin sur la marbordo por ilin sekigi.

Bazo de Laminarikulturado

En la lastaj dekelkaj jaroj, Kingdaŭ fariĝis bazo por disvolvo de la laminaria kulturado. Ĉi tie oni okazigis sinsekve plurajn kursojn pri tekniko de laminaria

kulturado, kaj jam edukis multajn teknikistojn posedantaj necesajn sciencajn konojn kaj praktikajn metodojn pri laminaria kulturado. Kaj tien vizitis ankaŭ multaj alilandaj delegacioj el Sovetunio, Pollando, Koreio, Vjetnamio kaj Hindio, reprezentantoj de enlandaj akvoproduktaj institucioj el provincoj Fugian, Ĝegiang kaj multaj biologiaj studentoj de diversaj altlernejoj. Ankaŭ gelernantoj de mezlernejoj de la urbo ofte venas por rigardi sur boatoj la kulturatajn laminariojn.

Antaŭ la Liberiĝo nia lando ne produktis multe da laminarioj, kaj devis importi tion el aliaj landoj. Kaj nun la laminarioj produktataj ĉe Kingdaŭ, ne nur sufiĉas por kontentigi la bezonojn de la lando, sed ankaŭ komencas esti eksportataj alilanden.

Plivastiĝas kun ĉiu jaro ankaŭ la areo de laminariaj kulturejoj. Antaŭ kelkaj jaroj ili limigis sin ĉefe ĉe Tuandaŭvan. Sed en la lastaj jaroj, precipe post la vasta organiziĝo de popolaj komunumoj en 1958, la laminaria kulturado fariĝis produkta entrepreno de la amasoj, kaj multaj komunumoj situantaj ĉe marbordo, senescepte fondis produktajn brigadojn por laminarikulturado. Nun la tuta Giaŭĝoŭ-golfo estas jam malfermita por kulturado de laminarioj sub la principo fari nenian ĝenon al navigaciaj vojoj, kaj la kulturejoj ekspansias eĉ pli malproksimen al la ekstera maro.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Cigno-lago Trovita sur la Tegmento de la Mondo

Lago de cignoj estas trovita antaŭ nelonge de iu ĉina montgrimpista grupo. Ĝi estas konata tiuloke kiel “Perlo en la Neĝmaro”, kaj situas 3,500 km. super la marnivelo ĉe la piedoj de la tri plej altaj montpintoj de Pamiro.

Multaj cignoj blankaj kaj nigraj troviĝas tie. Ili naĝas sur

la speguleska surfaco de la akvo kaj nestas sur insuleto en la lago.

Novaj Aŭtovojoj en Interna Mongolio

Ok novaj aŭtovojoj estas finkonstruitaj en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en lasta jaro. Tiuj aŭtovojoj kondukas al la agrikulturaj kaj paŝtaj areoj. 80% el la popolaj komunumoj estas interligitaj dank’ al la peraŭta trafiko.


En la jarkunveno de 1962 de la Ĉina Astronomia Societo, okazinta antaŭ nelonge, estis legita serio da disertacioj, el kiuj unu estas *Observoj pri Sep Variantaj Asteroidoj*. La studado pri fizikaj fenomenoj de asteroidoj estas ankoraŭ relative nova tereno en astronomio de nia lando.

En fora antikveco oni jam sciis, ke en la ĉielo troviĝas kvin planedoj, nome: Venuso, Jupitero, Merkuro, Marso kaj Saturno. Sed, la multajn malgrandajn planedojn moviĝantajn ĉirkaŭ la suno en la vasta spaco inter la orbitoj de Marso kaj Jupitero, oni ektrovis iom post iom, nur post 1801. De kiam la itala astronomo Piazzi eltrovis la unuan asteroidon Ceres, la asteroidoj eltrovitaj ĝis nun, de diverslandaj astronomoj jam nombriĝas pli ol 1600, el kiuj la asteroido n-ro 1125 estis eltrovita en 1928 de iu ĉina studento kiu tiam lernis fremdlande. La asteroido estis nomata "Ĉina N-ro 1" kaj la eltrovo de tiu ĉi asteroido akiris honoron por la astronomio de nia lando, tiam ege postrestinta. Tiu ĉina studento estas Ĝang Juĝe, la aŭtoro de la disertacio supre menciita. Li estas nun unu el la famaj astronomoj de nia lando, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj estro de la Observatorio de Ziginŝan de la Ĉina Aka-

demio de Sciencoj, kaj en la nomita jarkunveno estis refoje elektita kiel prezidanto de la Ĉina Astronomia Societo.

Antaŭ pli ol 30 jaroj, juna Ĝang Juĝe revenis de fremdlando al la patrio kun plena entuziasmo por fari novan kontribuon al astronomio. Sed tiam en Ĉinio, sub la regado de reakciuloj kaj invado de imperiistoj, ne troviĝis eĉ pli malpli bona observatorio konstruita per nia propra forto, kompreneble, oni ne povis paroli pri tereno por agado de astronomo. Ĝang Juĝe povis nur labori provizore kiel instruisto en universitato. Ĝuste kiam la reakcia registaro fuŝe finkonstruigis ornamcele la Observatorion sur la monto Ziginŝan en Nankino, la militfajro bruligita de japanaj invadistoj jam atingis ties antaŭurbon. Ĝang Juĝe kune kun siaj kolegoj silente malmuntis la teleskopon lenson kaj kunportis ĝin kiel trezoron al urbo Kunming en interna parto de Ĉinio. Sed sole

Ĝang Juĝe en laboro



per la lenso oni povis fari nenian observon kaj esploron pri astroj. Dum la maltrankvilaj militaj jaroj Ĝang Juĝe migradis kun siaj edzino kaj infanoj de loko al loko, vivis en Ĉunkino, Ĉengdu, Kunming, k.a., ĉiam maltrankvile. En la plej malfacilaj tagoj, li devis eĉ forvendi kun doloro siajn librojn necesajn por sciencaj laboroj.


Kvankam la vivo estis ege malfacila, sed Ĝang Juĝe neniel volis preterlasi ĉiujn okazojn por fari astronomiajn observojn. En 1941, post preskaŭ duonjara preparado kaj longa vojaĝo, li iris al Lintaŭ, Gansu-provinco, kaj tie observis la plenan eklipson de la suno. Pro manko de necesaj instrumentoj li ne povis daŭrigi la observadon de asteroidoj, li do kalkulis la orbiton de la asteroido laŭ materialoj antaŭe akumulitaj per kaduka kalkulmaŝino.

aj Asteroidoj

Post la venko de la Rezistmilito kontraŭ Japanio, Ĝang Juĝe estis sendita por fari esplorvojaĝon en Usono. Li tutkore esperis ke post reveno al Ziginŝan li povos ree komenci sian laboron kun nova forto. Sed neatendite la reakcia kuomintang-a registaro nuligis sian promeson pagi por li la revenan vojaĝkoston. Pro tio la edzino de Ĝang Juĝe devis plendi kaj helpi peti ĉe diversaj instancoj, sed nenio rezultiĝis. Iu aŭtoritatulo de la reakcia registaro eĉ malaprobe diris: "Ĉu necesas astronomio en la nuna tempo? Li prefere serĉu laboron en fremda lando!"

Sed ĉio ĉi ne povis ŝanceli la volon de Ĝang Juĝe reveni al la patrio. En majo de 1948, estis videbla la plena eklipso de la suno en Azio de Aleŭtiano-insularo ĝis la duoninsulo-Hindoĉinio. Ĝang Juĝe bonŝance partoprenis la observan grupon senditan de la Ŝtata Fiziografia Societo de Usono al Ĝegiang-provinco de Ĉinio, kaj sukcesis reveni al la sino de la patrio.

Post la Liberiĝo de nia lando, la alta pritakso kaj zorgado de la popola registaro pri sciencaj laboroj kaj sciencistoj reardigis la koron de Ĝang Juĝe. La sumo elspezita de la ŝtato por plimultigo de astronomiaj instrumentoj kaj instalaĵoj kaj por ĝiaj kapitalaj konstruaĵoj ekde la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko ĝis nun egalas jam al ĉ. 15-oblo de kiom oni elspezis dum la 38 jaroj ekde la revolucio de 1911 ĝis la Liberiĝo de nia lando. Hodiaŭ, sur la monto Ziginŝan jam rekonstruiĝis observatorio ĉiam pli perfektiganta. La kupoloj de ĝiaj observejoj brilas unuj apud aliaj sub la sunlumo, fiere deklarante pri sia renaskiĝo. Kune kun la rekonstruiĝo kaj disvolviĝo de la observatorio, ankaŭ la studo pri asteroidoj bone progresas sub la gvido de Ĝang Juĝe. La asteroido "Ĉina N-ro 1" eltrovita de Ĝang Juĝe iam "malaperis" pro la interrompo de observo kaj ĝi estis



Ĝang Juĝe pristudas kun sia asistanto la orbiton de iu asteroido. *Foto de Vang Venhua*

retrovita nur en 1957 kiam la 60-centimetrodiametra reflektita teleskopo estis refunkciigita.

Tiam en vintraj noktoj, Ĝang Juĝe kaj liaj asistantoj observadis per la teleskopo, kontinue postsekvis ĝin dum pli ol du monatoj kaj post multfojaj grandnombraj kalkuloj ili fine elkalkulis la orbiton de tiu ĉi asteroido, kiu tre proksimumas al la rezulto de la observo antaŭ pli ol 30 jaroj.

Antaŭ kaj post la retrovo de la asteroido "Ĉina N-ro 1", Ĝang Juĝe kaj liaj asistantoj eltrovis sinsekve ankoraŭ 31 novajn asteroidojn, pri kiuj neniuj literaturo antaŭe menciis. Ili estas provizore nomataj "Zigin Numeroj 1-32". La orbitoj de ok el ili estas jam elkalkulitaj post multfoja observado kaj ili baldaŭ ricevos oficialan nomon kaj numeron post refoja observo.

La rapida disvolviĝo de astronomio en nia lando donis al Ĝang Juĝe grandan kuraĝigon kaj igis lin akiri unu post alia pli gravajn sukcesojn en sia laboro. La nomita disertacio estas unu el la sukcesoj kiujn li atingis lastatempe.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Kamparaj Sciencaj Stacioj

En 1956 stariĝis stacioj de agrikultura eksperimentado en Luodian-gubernio de Gujĝoŭ-provinco. Dank' al ĝia scienca eksperimentado, nun en la gubernio enkondukiĝis durikoltaj rizo kaj maizo kaj ankaŭ la vintran tritikon oni komencis kulturi tie. Tio altigas la produkton ĉirkaŭ du trionojn kompare kun antaŭe.

Dekoj da plibonigitaj specoj de rizo, tritiko, rapo, arakido kaj multaj legomoj estas enkondukitaj de la stacio en la gubernion.

Krome, la stacio ankaŭ disvastigas sciencajn agrikulturajn sciojn al la popolaj komunumoj per diversaj metodoj: Ĝi invitis dekmilojn da komunumanoj viziti la stacion por komprenigi al ili kaj disvastigi la progresajn agrikulturajn teknikojn. Centoj da

broŝuroj pri novaj agrikulturaj teknikoj estas kompilitaj kaj disdonitaj de la stacio ĝis la plej malproksimaj vilaĝoj en la gubernio. Kaj pli ol 600 agrikulturaj teknikistoj estas edukitaj de la stacio, ke nun en ĉiu produkta grupo de la popolaj komunumoj troviĝas almenaŭ unu tia teknikisto.

Centoj da tiaj stacioj nun troviĝas en la montoza, Gujĝoŭ-provinco.

TERKULTURISTO

Ilustraĵoj de Vu Venjuan

CIE ajn en tiu ĉi hiango*, je mencio pri Vang la Dua de la Suda Vang-vilaĝo, oni asertas senescepte ke li estas vera terkulturisto. Vang la Dua estis loĝanto norde de la rivero Ŝahe. En la jaro de inundego li alfuĝis pro malsato el sia naskiĝloko vekte portante paron da korbaj por brulligno kaj herbo kaj enloĝiĝis en tiun ĉi kotonproduktejon. Antaŭe li havis du filojn kaj du filinojn. La unua filo estis milicano, kiu viktimiĝis en tunelo dum la milito kontraŭ la japanaj invadantaj diabloj kaj la dua estis soldato de la Liberiga Armeo, kiu oferis sian vivon ekster tranĉeo en batalo por liberigi Sigiaguang. Liaj du filinoj edziniĝis hejmloke. La unua estas edzinigita al estro de produkta brigado en la Orienta Vang-vilaĝo kaj havas filon nomatan Mandun, dum la dua al sekretario de particele en la Okcidenta Vang-vilaĝo kaj havas filinon nomatan Hiuhua, Mandun estas unu jaron pli aĝa ol Hiuhua. Ili ambaŭ lernas en la malsupera mezlernejo de la Popolkomunumo de la Suda Vang-vilaĝo kaj manĝas ĉe la avo.

La avo amas la du gejunulojn kiel siajn pupilojn kaj ofte konsilas al ili:

“Bone lernu. Terkulturisto legfacila — vera tigro kunflugila.”

Mandun trovas la vortojn tre plaĉaj, sed Hiuhua opinias kontraŭe. Iufoje, kiam ili denove priparolis la temon, Hiuhua eksvingis la harplektaĵojn kaj diris al la avo paŭtante:

“Kiam ajn vi ekmalfermas la buŝon, vi parolas pri terkulturado. Vi jam terkulturadis la tutan vivon ĝis la korpo kurbiĝis, sed vi ankoraŭ ne sentas tion sufiĉa!”

“El la sepdek-du profesioj,” diris la avo, “terkulturado estas la plej grava. La ĉiel-skrapantoj konstruiĝas ekde la bazo. Por konstrui

la socialisman domegon, la unua tasko estas produkti pli multe da greno. Ĉu oni povus konstruadi kun malsata stomako? Niaj prauloj estis terkulturistoj generacion post generacio. Sed vi, bubino, verŝajne eĉ iom malestimas la terkulturistojn?”

“Kiu malestimas la terkulturistojn?” ruĝiĝinte Hiuhua sin pravigis. “Ĉiu ja povas havi sian ideon!”

“Ŝi volas enĉieligi!” intermetis Mandun.

* *Hiango: Administra subdivido de gubernio.*



“Kaj vi, vi volas enteriĝi,” tuj repagis Hiuhua.

“Kion signifas viaj enĉieliĝo kaj enteriĝo?” demandis la avo senkomprene.

“Ŝi volas,” diris Mandun ironie, “direkti aeroplanon, veturi al Marso per raketo kaj fariĝi sciencisto!”

“Kaj vi,” respondis Hiuhua necedeme, “vi volas enteriĝi por serĉi manĝaĵojn kaj tuj fariĝi agronomo!”

“Nu,” intermetis la avo, “vi enĉieliĝu laŭ via volo kaj li enteriĝu laŭ sia bontrovo. Ĉiu agu laŭ sia prefero.”

Farante dikajn lipojn, Hiuhua diris:

“Vi ĉiam agas favore al li!”

Jes, tiel estas ke ĉiu el la gejunuloj, havas sian kalkulon. Kvankam Vang la Dua ŝatas Hiuhua, li tamen ankoraŭ pli ŝatas Mandun. Hiuhua ĉirkaŭdancas inter la floraroj kvazaŭ abelo, zumante kaj allogante. Mandun estas kvazaŭ formiko, kiu laboregas sur la tero senbrue kaj vekante nenies atenton. Hiuhua ŝatas kanti, danci, revii kaj estas eksterordinare kapricema. La avo diras, ke ŝi vivas kvazaŭ en nuboj, jen ludas venton, jen ludas pluvon. Mandun ŝatas fizikan laboron, kaj li estas ekstreme explorema kaj scivolema kun senfinaj demandoj. La avo diras, ke li estas plenaĝulo-knabo, bona junulo solide fidinda kiel ŝtonrulo.

Rilate al la du gejunuloj, ankaŭ ĉiu el liaj filinoj havas siajn proprajn opiniojn. La unua filino pli ŝatas Hiuhua, opiniante ke la knabino estas lerta, ambicia kaj povos havi brilan karieron. La dua filino ŝatas Mandun, asertante ke la junulo estas honesta, saĝa kaj serioza. Kvankam ambaŭ fratinoj ne eldiras, ĉiu tamen jam havas sian intencon: la pli aĝa fratino volas preni Hiuhua kiel sian bofilinon, dum la juna fratino volas havi Mandun kiel sian bofilon. Ankaŭ Vang la Dua intencas helpi al la geedziĝo. Sed ĉar la geknaboj estas ankoraŭ tro junaj kaj iliaj propraj pensoj estas ankoraŭ ne konataj, tial neniu iam parolis pri tio.

En 1960, Mandun kaj Hiuhua estis diplomitaj el la malsupera mezlernejo. Plenraziginte la kapon, Mandun iris al la farmo de la komunumo kaj trovinte Vang la Duan alparolis:

“Avo, mi decidas partopreni en agrikulturo. Prenu min kiel vian metilernanton!”

Antaŭ ol Vang la Dua povis respondi, li jam prenis ŝpaton kaj eklaboris.

Kion faris Hiuhua? Post longa konsiderado ŝi finfine partoprenis kaj trapasis la eniran ekzamenon de la Agrikultura Teknika Lernejo en la guberniurbo. Kiam Hiuhua ricevis la sciigon pri la enira permeso de la agrikultura lernejo, ŝi rapidis al la farmo kvazaŭ kirlovento por serĉi Mandun. Ŝi trovis lin pluganta bovon pelante, kun la sunumata senhara verto filtranta oleon kaj la piedoj kaj kruroj kotoplenaj. Vidante ke Mandun efektive komencas labori,

ŝia koro ektremetis pretervole kaj post momenta stultiĝo ŝi laŭte vokis:

“Mandun, Mandun. . . .”

“Ho, vi jam revenis!” diris Mandun ekreturninte la kapon.

“Vidu,” svingante la sciigilon, Hiuhua diris anhelante, “mi ricevis eniran permeson. Morgaŭ la agrikultura lernejo okazigos refoje eniran ekzamenon por novlernantoj. Jam preparu vin kaj enregistru vin por ĝi!”

Mandun plugis ĝis la kamprando, krihaltigis la bovon kaj kapneante diris:

“Ĉu mi ne jam diris al vi? Mi laborados ĉi-maniere. Finfine do ĉiu el ni iru sian vojon.”

“Ĉu vi ne intencis fariĝi agrikultura specialisto?” diris Hiuhua. “Tia bona ŝanco! Se vi ne iras. . . .”

“Bonvolu iri,” respondis Mandun. “Mi volas fariĝi terkulturisto en ties propra senco.”

Hiuhua ekpintigis la buŝon kaj diris:

“Dumvive teni la bovovoston! Ĉu via koro ŝtoniĝis?”

“Kio malbona?” demandis Mandun. “Ankaŭ teni la bovovoston estas nefacile. Vidu, miaj plugitaj sulkoj similas al drakoj en danco. Ĉiel ajn mi ne sukcesas plugi ilin rektaj.”

“Ah!” kriis Hiuhua saltetante. “Ni direktos ferbovon kaj konstruos elektran puton; sed vi, vi firme tenas la bovovoston!”

Sidante sur la plugilo, Mandun diris malrapide:

“La supreniron de ŝtuparo, oni devas fari ŝtupon post ŝtupo, sed vi volas enĉieliĝi per unu sola paŝo!”

“Ja pro vi mi ŝanĝis mian volon, sed vi. . . .” Ne fininte la parolon, Hiuhua eksvingis la paron da harplektaĵoj kaj forkuris.

Mandun ne atendis sian subitan elglitigon de tiuj ĉi vortoj. Lia koro ekardis. Haste li stariĝis kaj postkriis:

“Hiuhua, Hiuhua. . . .”

Sed Hiuhua jam forflugis kvazaŭ fringelo kun etenditaj flugiloj.

“Kio? Ĉu ankaŭ vi disetendas la flugilojn?” Li rigardis returnen kaj neatendite vidis ke malantaŭ li staras la avo lin fikserigardante.

“Ŝi ne komprenas min,” li diris ruĝiĝante.

La avo ekfrapis lian ŝultron kaj demandis: “Kaj vi, ĉu vi ŝin komprenas?”

Mandun kapneis kaj subite ŝanĝis la paroltemon: “Avo, vidu. . . .dum la plugado mi neniel sukcesis fari rektajn sulkojn!”

“Oh, kiam via volo estos rekta, ankaŭ la sulkoj estos rektaj.”

La avo tenis la tenilon de la plugilo kaj diris ŝerce:

“En plugado rigardu la bovokornon, en veturigado la vojsulkon. Estas senutile nur zorgi sub la piedoj.”

Li ekkriis al la bovo, kaj tiu ĉi takte spiregante ekmoviĝis antaŭen malrapide. La soko susure turnadis la humidan grundon, postlasante strion da simetria kaj rekta terrubando. Remaĉante kion la avo instruis, Mandun bone enmemorigis tiun ĉi plugon. . . .

La sekvintan tagon, Mandun akompanis Hiuhua al la agrikultura lernejo en la guberniurbo portante por ŝi la litajpakon sur la dorso. Survoje Hiuhua senparole kuris antaŭe kvazaŭ ventoblovo. Mandun alvenis kun ŝi al la lernejo, aranĝis ĉion en ordon kaj estis reironta, kiam Hiuhua diris sopire:

“Mi forakompanu vin.”

“Bone,” diris Mandun.

La du gejunuloj iris el la urbopordego, unu antaŭe kaj la alia poste. Transirinte la ĉirkaŭurban foston, Hiuhua buŝsignis:

“Iru ĉi tien!”

Mandun sekvis ŝin surpaŝi la vojeton sur la bordo de irigacia kanaletoj. En la klara akvo speguliĝis la bildo de la paro. La vergoj de la salikoj apud la kanalo milde tuŝis iliajn vestojn kvazaŭ plukante ilian korkordon. Hiuhua malsupreniris de la bordo kaj iris sub grandan salikon, dirante:

“Ni iom ripozu! Pro kio ĉiam iradi?”

Mandun sin apogis al la trunko de la arbo kaj pensis en la koro: “Kiu tion volas?” Hiuhua alstaris tuj apud Mandun kaj rigardante la lazuran ĉielon kun levita kapo diris:

“Vidu, estonte. . . .”

Mandun ekklinis la kapon kaj jetinte rigardon al la foren etendiĝanta tero ŝin interrompis:

“Mi vidas, ke nuntempe. . . .”

“Kia kverelemo! Vi ne lasas min eĉ unu frazon paroli kun vi en paco!”

“Do ne parolu!” pensis Mandun. Kapturninte al li, Hiuhua demandis:

“Ĉu vi ankoraŭ memoras, kion Avo diris al ni antaŭ kelkaj jaroj?”

“Kompreneble,” respondis Mandun.

“Li diris, ke por konstrui la socialisman domegon, la unua tasko estas produkti pli multe da greno. . . .” diris Hiuhua. “Tial ni devas havi mekanikigon, elektrigon. . . .”

“Ni ja ne povas ĝisatendi la aperon de traktoroj kun paro da malplenaj manoj,” diris Mandun.

Hiuhua piedbatis kaj kriis:

“Mi volas pridiskuti problemon kun vi, sed via parolo ĉiam pikas!”

“Mi diras la veron.” Mandun diris ridante. “La manĝaĵoj, kiujn ni prenas, estas el la ordinara laboro de la terkulturistoj kaj la vestoj, per kiujn ni nin kovras, estas el la ordinara laboro de la laboristoj. Se ni volas mekanikigon. . . .”

Antaŭ ol Mandun povis fini sian parolon, Hiuhua eksvingis la harplektaĵojn kaj forkuris. Unuspire ŝi surkuris la kanaldigon kaj malaperis en la ruĝon de la subiranta suno sen returni la kapon. Mandun staris tie gapanta kaj rigardante al la bone konafa

dorssilueto de ŝi pensis bedaŭre: “Ĉu estas, ke mi ne komprenas ŝin, aŭ ke ŝi. . . .”

Kiam Mandun revenis, la avo jam pretigis la tablon por la manĝo. Li sidis sur ligna ŝtupo plektante fekaĵ-korbon. Mandun sidigis apude kaj diris balbute:

“Diru al mi, avo, kiel oni povas esti promesplena!”

“Kio?” demandis la avo levante la kapon. “Ĉu Hiuhua diris ke vi ne estas promesplena?”

“Ne,” respondis Mandun kun klinita kapo, “mi volas scii, ĉu oni estas promesplena se oni nur havas grandan aspiron sed ne promesplena se oni faras solidajn laborojn?”

“Nura aspiro sen ago,” diris la avo: “estas sensenca aspiro, kaj nura rigardo sen ago egalas al senutila rigardo. En Ĉinio estas jena proverbo: Unue aspiro, poste akiro; Alte staru por vidi fore.

Hiuhua eksvingis la paron da harplektaĵoj kaj forkuris.



Ĉu vi ne vidis ke la rotestro ordonas en militekzer-cado: 'Celo, rekte en la fronto. Ekmarŝu!' Unue manĝu! Post la manĝo ni babilu plu!"

Liaj vortoj malligis la brovojn kaj ridigis la okulojn de Mandun. Li pensis en si, ke estas la avo kiu plene konas lian koron. La instruisto diris: "La milmejla vojaĝo komenciĝas de sub la piedoj." Kiam la celo estas fiksita, mi marŝu antaŭen paŝon post paŝo. Post la manĝo la avo donis al li la nove plektitan fekaj-korbon, dirante:

"Por terkulturisto, la plej grava tasko estas porti surdorse fekaj-korbegon dum vojirado. Se vi efektive volas esti terkulturisto, vi devas transpreni tiun ĉi heredan trezoron."

Transpreninte la fekaj-korbon, Mandun eksentis nesubpremeblan ĝojegon. Li aŭdis de onjo ke la avo bonstatigis la familion ĝuste dank' al unu fekaj-korbo. Ekde kiam li enloĝiĝis ĉi tie, li ĉirkaŭiradis kun fekaj-korbo sur la dorso. Vintre en ĉifona nankena robo vatita kun blua zono ĉirkaŭ la talio kaj somere en malnova veŝto kaj nankena pantalone, li vagis laŭ la Cangĝou-Ŝigiaĝuanga Ŝoseo al la stacidomo kaj de tie al la Suda Vang-vilaĝo, kaj liaj fekaj-amasoj troviĝis ĉie laŭ la tuta ŝoseo. . . . Tiun jaron, kiam lia unua filo estis brulmortiĝita de japanaj diabloj en tunelo, li longe stulte staris kun fekaj-korbo sur la dorso antaŭ la kadavro de sia filo kaj poste kolektis fekajon per ĉiuj fortoj. Li ŝutis la kolektitan fekajon antaŭ la tombo de la filo kaj poste portis ĝin hejmen. Tio daŭris tri tagojn. En la kvara tago, kvazaŭ vekiĝinte el sonĝo, li tiris la duan filon per la mano, iris al la vilaĝestro kaj diris:

"Lasu lin iri! Li venĝu sian fraton!"

Persone kondukante la ĉevalon de la filo, li forakompanis lin el la vilaĝo. Kiam la malfeliĉa novaĵo pri la morto de lia dua filo en batalo ĉe Ŝigiaĝuang alvenis al la vilaĝo, ĉiuj maltrankviliĝis pro li, sed la maljunulo sukcesis tion elporti. Kun fekaj-korbo sur la dorso, li iris laŭ la Cangĝou-Ŝigiaĝuanga Ŝoseo rekte al Ŝigiaĝuang, intencante vidi la lokon kie viktimiĝis lia filo. Kiam li revenis, malaperis la malĝoja nubo sur lia vizaĝo kaj al ĉiu kiun li renkontis li diris:

"La morto ja ne estas vana. Li baris la maŝin-pafilon de la japano-hundaĉoj per sia brusto!"

Post la agrara reformo, estis disdonitaj al li domo kaj tero. Li laboris pli energie ol antaŭe. Kvankam la malnova vatita robo ŝanĝiĝis en novan peltajon kaj la ĉifona veŝto en novan jakon, li ankoraŭ kolektis fekajon korbon post korbo.

"Vi jam maljuniĝis kaj devas ripozi!" iuj konsilis.

"Mi ne povas ripozi," li respondis, "alie disiĝos mia ostaro."

"Homo kia vi," diris aliaj, "ja povas ĝui frandan manĝon kaj bongustan supon atendante kun etenditaj manoj. Ĉu la ŝtato povas ne pensii vin!"

Sed li ekskuis la kapon kaj diris:

"Kia diro! Se ĉiuj dependus de la ŝtato, de kiu dependu la ŝtato? Por kio utilas la homaj manoj, se ne por labori?"

Post la popolkomunumigo, li ankoraŭ ĉien ĉirkaŭiris dorsportante la fekaj-korbon. Se li vidis ke oni semas, li aliris esplori la humidecon de la grundo. Se li vidis ke oni rikoltas, li aliris esplori la stoplojn. Li estis invitita partopreni en la konsilantaro de veteranaj kamparanoj en la vilaĝo, li esitis invitita ĉeesti la kunsidon de veteranaj kamparanoj en la guberniurbo, kaj li estis petita fariĝi la teknika gvidanto en la agrikultura eksperimentejo de la komunumo. . . . Kaj en ordinara tempo, oni lin konsultis eĉ por certiĝi pri tiaj aferoj kiel ekzemple kiam ventos aŭ pluvos. Mandun ofte aŭdis ke la partisekretario diras: "Maljuna avo en la domo valoras pli ol trezorgnomo." Mandun pensis en si: Avĉjo vere estas trezorulo kun tiom da valoraj spertoj. Sed Hiuhua vidas en la avo nur kurbiĝintan kadukulon. Tutkore li volas fariĝi tia terkulturisto kia la avo. Ne, li volas heredi la laboron de la avo kaj fariĝi nova terkulturisto.

Duonmonato jam forpasis nerimarkite de post kiam Hiuhua iris lerni en la agrikultura lernejo. Mandun pensadis pri ŝi. Li tre volis skribi leteron al ŝi por fari klarigon. Sed li neniam agis kiel Hiuhua kiu ĉiam havis sian penson sur la lipoj, nek estis tiel ŝanĝiĝema kiel ŝi. Li ĉiam bone kaŝis sian volon en koro kvazaŭ semo, kiu burĝoniĝas des pli frue, ju pli bone terkovrita ĝi estas. Li esperis, ke frue ĝi floru kaj portu fruktojn. . . .

Iun tagon, subite li ricevis leteron de Hiuhua. Lia koro ekbatis malgraŭvole. Malferminte la koverton, li trovis du leterfoliojn dense skribitajn. Detale ŝi konigis al li ĉion pri la lernejo. Ŝajnis, ke ŝi tre ŝatas la lernejon. Ŝi intencis revivigi lian amon al lerneja vivo, por ke li reiru al lernejo. En la letero ŝi emociplene skribis interalie:

. . . . En la supera elementa lernejo ni kune lernis kaj en la malsupera mezlernejo ni estis en la sama klaso. Sed nun. . . . Mi vin ne riproĉas. Mi ne kredas, ke vi ne ŝatas lernadon. . . . Venu! Kvankam duonmonato jam forpasis de post la komenciĝo de la lernperiodo, mi aŭdis ke okazos ankoraŭfoje enira ekzameno.

Krome, mi sciigu al vi treege bonan novaĵon ke morgaŭ matene nia lernejo invitos specialiston kun praktikaj spertoj prelegi al ni pri la kulturado de kotonplantoj. Nepre venu por aŭskulti tiun ĉi lecion! Venu, kaj mi rezervos por vi sidlokon. Nia lernejo bonvenigos eksterlernejajn lernantojn veni aŭskulti. . . .

"Ĉu mi sciigu tion al la avo?" La tutan nokton Mandun ne povis bone dormi. La letero similis ŝtonon ĵetitan en lian vivon, estigante cirkulon post cirklo da ondetoj en lia jus kvietiĝinta penso. La

sekvintan tagon post la matenmanĝo, li prove petis forpermeson de la avo:

“Avo, mi intencas viziti la urbon.”

“Kio?” ridetante la avo diris. “Ni ambaŭ metos la krurojn en la saman pantalon tubon! Iru do! Ankaŭ mi vizitos ĝin.”

La avo iris antaŭe kun fekaj-korbo sur la dorso kaj Mandun sekvis lin ankaŭ kun fekaj-korbo sur la dorso. Survoje, kiam ili vidis milikampon, la avo demandis: “Ĉu vi povas diri al mi la specnomon de la miliplantoj?” Vidinte kotonkampon, li demandis: “Kio estas specnomo de la kotonplantoj?” Kelkfoje Mandun kontraŭdemandis la avon por kapti la aktivecon.

“Por esti terkulturisto”, la avo diris, “oni devas havi tri diligentecojn: diligenteco de la buŝo—ofte demandi; diligenteco de la kruroj—ofte iri; kaj diligenteco de la manoj—ofte labori. Lernante metion, oni devas klopodi por enpenetriĝi anstataŭ atendi ke oni vin instruu direktante viajn manojn. . . .”

Interparolante la avo kaj nepo senrimarke alvenis al la vojforko de la orienta antaŭurbo. “Mi volas iri al la agrikultura lernejo,” pensis Mandun en si, “sed kiel mi diru al la avo?”

“Vizitu kinejon aŭ teatron laŭ via plaĉo!” diris la avo iniciate. “Mi iros al la agrikultura lernejo por pririgardi grenplantojn.”

“Ankaŭ mi iros al la agrikultura lernejo.” kriis Mandun nereteneble.

“Ĉu vi vizitos Hiuhua?” demandis la avo ridante kun duonfermitaj okuloj.

“Hiuhua diris, ke ili invitas specialiston prelegi hodiaŭ.” Mandun rapidis klarigi ruĝiĝante malgraŭvole. “Mi volas aŭskulti. . . .”

Kiam ili proksimiĝis al la lernejo, Hiuhua jam elvenis renkonti ilin de malproksime. Rimarkinte la avon, ŝi unue miris kaj poste ĝojis. Tenante unu el liaj brakoj, ŝi diris kokete:

“Kial ankaŭ vi venas, Avo?”

“Mi venas vidi kiel iras via enĉieliĝado. Kie estas viaj instruistoj?”

Aŭdinte la voĉon de la avo, la lernejestro rapideme elvenis kaj kompleze invitis lin en la domon.

Elturriĝinte el embaraso, Hiuhua salutis Mandun, dirante: “Ah, ankaŭ vi portas fekaj-korbon surdorse? Venu, ĉar la specialisto ankoraŭ ne venis, mi montru al vi niajn agrikulturajn maŝinojn.”

Mandun sekvis ŝin al la placo en la malantaŭo. Hiuhua fingre montris al li la maŝinojn kaj klarigis:

“Rigardu! Jen estas ‘Ruĝas Oriento’. Jen estas ‘Ferbovo’ fabrikita en Tiangin. Jen estas kvinsoka plugilo. Jen estas multdenta erpilo. Jen estas kotonsemilo. . . .”

Mandun estis jam parolonta, kiam eksonoris por komenci la lecionon. Hiuhua haste tiris Mandun per la mano en la klasĉambron. Ŝi lasis lin sidi sur benko apud ŝi. Aŭdiĝis varma aplaŭdo kaj envenis la lernejestro kun la specialisto. Hiuhua plenforte aplaŭdis. La lernejestro unue surpodiĝis kaj faris enkondukon:

“La specialisto, kiun ni esperis kaj atendis longe jen alvenas hodiaŭ. . . . Jen estas la specialisto de kotonkulturado Vang la Dua, konata tra la tuta gubernio. Ni petas lin prelegi al ni pri siaj spertoj en kotonkulturado.”

Denove ekaŭdiĝis arda aplaŭdado. La avo iris sur la podion kaj ridante diris modeste:

“Mi estas terkulturisto. . . .”

Hiuhua ĵetis rigardon al Mandun kaj Mandun ankaŭ ekrigardis al ŝi kun elstaraj okuloj. Hiuhua pensis en si: “Kiel povas esti la avo?” Verŝajne Mandun estis demandanta: “Ĉu vi ne scias efektive?” Rigardante la avon sur la podio, Hiuhua estis ekzaltita de la ĝojiga penso, ke la avo estas specialisto. Mandun tamen multe maltrankviliĝis por la avo. Sed ne atendite, la avo paroladis torente sur la podio. Li klarigis malfacilajn teoriojn en simpla lingvo tiel ke ĉiuj estis forte absorbitaj. Pri la semado li diris:

*Kotonsemojn bonkvalitajn,
per varmakvo ĝermiĝitajn
kun plantcindro intermiksu,
poste en la grundon fiksu—
kaj ili ĉiuj elkreskos en kelkaj tagoj. . . .*

Pri la sarkado li instruis:
*somere sarku kotonkampon je ok fojoj,
la fruktoj estos tiel grandaj kiel ovoj. . . .*

Pri la branĉordigo li lekciis:
*La superfluaĵn branĉojn tuj forŝiru,
ke sakron pro van-kresko vi ne diru;
Se vi branĉpintojn ne forŝiros,
pri nuraj dikaj tigoj vi ekmiros. . . .*

Pri la rikoltado li prelegis:
*Por bona kotona rikolto,
kolektu po-arbe en ordo;
Por bona kotona kolekto,
ne vagu en ĉiu direkto. . . .*

Ju pli Mandun aŭskultis, des pli li ĝojiĝis. Ŝajnis al li, ke la avo estas viva lernolibro. Li prenis sian plumon kaj rapide notis ĉion, zorgante ke neniu vorto preterlasiĝu. Hiuhua kaŝe rigardis la mienon de Mandun kaj en ŝia koro des pli forte ondiĝis la pensoj. Ŝi pensis, ke malgraŭ tiel longa kunloĝado kun la avo, ŝi tamen ne sciis ke li estas specialisto. Do, estas ne strange ke Mandun avidas lerni de la avo. Ŝia koro denove disetendis siajn flugilojn; ŝi pensis ke ŝi simple ĉesigos la lernadon en la lernejo kaj helpas la avon por sumigi liajn spertojn, kion ŝi nepre plenumos pli bone ol Mandun. Ŝajnis, ke ŝi estas jam metilernanta ĉe la avo, kiu ŝin instruas

tenante sian manon. Li klarigas kaj ŝi lernas. Dum ripozo ŝi enskribas vortojn de la avo en notlibron. La notlibroj de spertoj amasiĝas pli kaj pli alten ekzempleron sur ekzempleron. . . . Ŝi staras kvazaŭ ĉe la loko de la avo, anoncanta al ĉiuj: Mi estas terkulturisto. . . . Nur kiam eksonoris por la finiĝo de la leciono kaj la avo malsupreniris de sur la podio en uragana aplaŭdado, ŝi vekigis kvazaŭ el sonĝo. La lernejestro akompanis la avon en sian laborĉambron kaj ankaŭ Mandun eniris sekvante. Li vidis ke aro da gelernantoj kun taglibroj en la manoj svarme ĉirkaŭis la avon kaj petas lin subskribi sian nomon. La avo ekprenis plumon kaj kun tremanta mano skribis en grandaj literoj: *Terkulturisto*. Li rerigardis la subskribon kun flanken kliniĝinta kapo kaj aldonis alian linion sub ĝi: *Nova Terkulturisto*. Li kapjesis kaj skribis post *Terkulturisto* la vorton *Mi* kaj aldonis post *Nova Terkulturisto* la vorton *Vi*. Tio vekis ĉe la gelernantoj eksplodon da ridoj. Ĝuste tiam aŭdiĝis de ekster la pordo akra krio: "Permesu!" Mandun alturnis sian rigardon kaj vidis ke enkuris Hiuhua.

"Kion vi volas, Hiuhua?" la lernejestro demandis kun miro.

"Sinjoro lernejestro, mi ne plu lernos ĉi tie. Mi reiros hejmen por partopreni en laboro."

"Vi estas prava nun!" intermetis Mandun.

"Miaj infanoj," diris la avo rigardante jen al Hiuhua, jen al Mandun, "vi ambaŭ estas eraraj. Estas malfacile transiri solŝtipan ponton kaj malfacile iri per unu piedo. Nia komunumo bezonas terkulturistojn surkampe kulturitajn kaj ankaŭ edukitajn el teknikaj lernejoj. Neniu flanko estas mankebla. Ĉu vi scias, ke ankaŭ mi estas lernanto de via lernejestro? Sen lia helpo mi tute ne scius kio estas fosforo, nitrogeno, kalio, nek scius kion signifas acida aŭ alkala. Ni uzos maŝinojn en la estonteco. Sen klereco kaj specialaj scioj oni fariĝos sentaŭgaj."

Hiuhua kaj Mandun rigardis unu la alian, kaj kore ekridis konvinkite.

Hiuhua kaj Mandun elvenis kun la avo, kaj tiu ĉi montrante la fekaĵon en la fekaĵ-korboj diris al la lernejestro:

"Ni restigu ĉi tion ĉe via fekaĵejo kiel donacon. Se oni terkulturas sen fekaĵo, la penlaboro iĝos vana



Subite ili sentis ke la lazura ĉielo estas tiel alta kaj la verda tero tiel vasta. . . .

paŝo." Dorsportante po unu fekaĵ-korbo, Hiuhua kaj Mandun iris al la fekaĵejo.

"Vi ja similas veteranan edukiston!" diris la lernejestro.

La avo iris kun la du gejunuloj el la pordego de la lernejo. Alveninte al la ŝoseo, ili vidis ke antaŭ iliaj okuloj etendiĝas senlima maro de kotonoj kaj sur la ŝoseo altas nove starigitaj stangoj de alttensia elektra linio atendantaj instaladon de elektraj fadenoj. Kiam ili venis al la vojforko, la avo subite returnen rigardis Hiuhua kaj demandis:

"Kiel oni devas iri por atingi la guberniurbon?"

"Ĉiu ajn vojo taŭgas!" respondis Hiuhua.

"Prave," diris la avo kun brilantaj saĝaj okuloj, "ĉiu vojo kondukas al Pekino! Vi ambaŭ nun iras sur la sama vojo."

Hiuhua ekridis sonore. Ĵetante rigardon al Hiuhua, ankaŭ Mandun ekridis. Subite ili sentis ke la lazura ĉielo estas tiel alta kaj la verda tero tiel vasta, sed iliaj koroj tiel proksimaj. La maljuna terkulturisto iranta antaŭ ili estas tiel aminda!

Trad. **Pandiŝo**

OLUNĈUNOJ

— Nomado Nun Fiksloĝanta

MI trapasis rajdante densan betularbaron kaj vastan stepon. Jam vesperis kiam mi atingis la vilaĝon de olunĉunaj ĉasistoj Naerkeki. La malleviganta suno ruĝigis la arĝentkoloran betularbaron, kvazaŭ bruligante ĝin en fajrego. Sur la vasta stepo antaŭ la vilaĝo ĉie pompis sovaĝaj floroj, brilante per belaj koloroj sub la vespera ĉielruĝo. Jen la ĉasista vilaĝo kuŝas en tiu loko pitoreska.

Mi deĉevaliĝis antaŭ la palispordo de la vilaĝo. Kelkaj ĉashundoj alvenis renkonte al mi sovaĝe bojante. Revokinte la hundojn, 12-13-jara knabo nomata Manda proksimiĝis al mi kun rideto. Brilis liaj okuloj, ruĝis liaj vangoj, kaj tre fortika estis lia korpo. Tirante min je la mano, li saltante kondukis min al la hejmo de k-do Gin. K-do Gin ekstaris de la hejtlito* kaj premis mian manon, kiam mi eniris lian domon. La familio de k-do Gin loĝis en domo kun tri ĉambroj. En la du flankaj estis po unu hejtlito,

Frua printempo — bona ĉas-sezono por la olunĉunoj

Foto de Hu Vej



kaj en la meza sin trovis du fornoj por kuirado. La domo estis fortika, kaj la fenestrovitroj brile poluritaj. Ĉi tiuj domoj estis konstruitaj de la registaro post la Liberiĝo por ke la olunĉunoj povu fiksloĝi.

La mastro tiam jam vespermanĝis. Kiam mi finlavis mian vizaĝon, la mastrino donis al mi du telerojn da legomaĵoj** kaj bovlon da rizo. Ili ambaŭ ridetis al mi kun bedaŭro, kaj k-do. Gin diris: “Vi venis iom malfrue, kaj ne estas viando por vi en tiu ĉi manĝo.”

La olunĉunoj estas tre gastamaj. Ili ne regalas gastojn per viando de la antaŭa tago. Mi diris: “Akiri legomon sur la montaro Daring-anling jam ne estas facile. Viaj manĝaĵoj estas tre bongustaj, pro kio do necesas viando!”

Nokte, k-do Gin aranĝis por mi dormejon. Estis tute novaj la littuko kaj vatita kovrilo, kaj la supra tego de la litkovrilo estis eĉ el atlaso. Kuŝante sur tia lito, mi neniel povis endormiĝi en la komenco. Obsedis min la penso: antaŭ la Liberiĝo, la olunĉunoj nomadis, ĉasante en praarbaroj de generacio al generacio, kaj loĝis en “fe-kolonaro”, kiu estis konusforma tendo el pli ol 30 lignaj stangoj, supre kovrita per betulŝelo aŭ bestfelo. Ĝi estis tre primitiva loĝejo, nepovanta ŝirmi ilin kontraŭ pluvo. Sennombraj olunĉunoj frostomortis dum neĝoŝtormo pro manko de taŭga loĝejo kaj varma vestaĵo. Sed, kiom multe ŝanĝiĝis ilia vivo nur kelkajn jarojn post fiksa loĝado.

Frumatene, mi aŭdis disputon inter la gemastroj. K-do Gin diris al la edzino: “Vi iru al la legomkampo kaj elfosu kelkajn bulbojn kaj terpomojn. Mi iros ĉasi beston por regali nian gaston.” Sed la edzino rapide deprenis la pafilon de sur la muro kaj respondis: “Mi iru ĉasi, kaj vi iru al la legomkampo. Ni vidu, kiu revenos la unua.” Disputinte por momento ambaŭ eliris.

La olunĉunoj, ĉu viraj ĉu virinaj, ĉiuj estas lertaj en ĉasado. Estis ne mirinde ke iu ajn el ili povis iri ĉasi. Mirinde tamen estis ke, kiam mi finis mian tualeton, k-do Gin jam revenis kun ĉasaĵo, sed lia edzino revenis de sia propra legomkampo nur pli malfrue. La lerteco de olunĉunaj ĉasistoj vere mirigis min.

En blua vesto kaj kun ruĝa tuko ĉirkaŭ la kolo, Manda ridetante venis al mi, tenante en la mano risortan ŝtonjetilon, kaj kondukis min por viziti la ĉevalejon, bovstalon, porkobredejon kaj la bredejon de malsovaĝigataj bestoj de ilia

* Masonaĵo, kiu estas hejtebla kaj servas kiel lito.

** Ĉinoj nomas rizon, farunaĵon kaj aliajn grenaĵojn ĉefa manĝaĵo. La aliaj akompanaj manĝaĵoj preparitaj el viando, fiŝo, legomo, ktp. estas “legomaĵoj”, kiuj estas bonguste kuiritaj kaj spicigitaj kaj servas por apetitigi la manĝadon de la ĉefa.

produkta brigado. Ni preteriris vastajn legomkampojn, kie kreskis tre bone plantoj de terpomoj, kukurboj, pizoj, rafanoj, brasikoj, bulboj, ajloj kaj aliaj. La kukurboplantoj suke verdaj surrampis la tegmentojn de ĉiuj domoj. Kulturado de legomoj estas nova afero por la olunĉunoj, efektivigita nur post kiam ili fikse ekloĝis. Antaŭ la Liberiĝo, ili havis nur viandon tiel por la ĉefa kiel por la akompana manĝaĵo. Ili satis aŭ malsatis, tio dependis de ĉasajoj, Kiam mankis al ili ĉasajoj, ili povis satigi sin nur per fungoj kaj sovaĝaj legomoj, tuberoj kaj fruktoj. Ofte okazis mortoj pro veneniĝo. Fiksloĝiĝinte la olunĉunoj sub la instigo de la popola registaro lernis kreskigi legomojn por plibonigi sian vivon, kaj ĉiuj partoprenis en plugado por kulturebligi teron. Nun ĉiu familio havas parcelon por sia legomkampo, kaj ne mankas al ili legomoj dum la tuta jaro.

Manda rampis sur la barilon antaŭ la kvin alkoj† bredataj de la produkta brigado kaj diris al mi: “Tiu kuŝanta estas kaptita de paĉjo, kaj tiu staranta, de k-do Gin.” Iu patrino alko naskis idon, kiu genuis sur siaj longaj antaŭkruroj por manĝi herbon kvazaŭ aminda ŝafido. Laŭ diro de Manda, kiam oni paŝtis ilin ekstere, ili ne forkuras, nek timas homon. En profunda arbaro, ili estas fakte tiel viglaj kiel cervoj. Ili ofte manĝas salikfoliojn kuŝante ĉe riverbordo, kaj fore aŭdinte homajn sonojn, ili tuj forkuras. Por kapti ilin, la ĉasistoj devas trapasi multajn densajn arbarojn, marĉeojn kaj transvadi multajn riverojn. Kaj iafaje, la ĉasistoj devas persekuti la bestojn ĝis alta krutaĵo por ilin kapti. En la pasinteco, la olunĉunoj ne bredis sovaĝajn bestojn. Ili ĉiam mortigis la ĉasajojn inkluzive la sovaĝajn anasojn. Ili senfeligis ilin surloke kaj dividis ilian viandon. Tiel iom post iom malmultiĝis la sovaĝaj bestoj. En 1958, la registaro ĝustatempe konsilis al ili kapti kaj bredi la sovaĝajn bestojn anstataŭ mortigi ilin. De tiam, ili ekbredis sovaĝajn bestojn. En Alihe, kie troviĝas la administracio de la Olunĉuna Aŭtonoma Flago‡, oni starigis cervobredejon. Unu ĉasbrigado sola en iu ĉasista vilaĝo kaptis pli ol 30 cervojn, kiujn oni sendis tien por bredi. La longa ĉasista vivo ebligis al la olunĉunoj bone koni la kutimojn de diversaj sovaĝaj birdoj kaj bestoj, kaj akumuli riĉan sperton. Dank’ al tio ili povos multe kontribui al la afero de bredado de sovaĝaj bestoj.

Kiam mi turnis min al la ĉevalejo, Manda estis for. Mi cerbumis, kien povus iri la bubo. Baldaŭ mi ekvidis lin veni tenante en la mano unu birdon kaj kelkajn fiŝojn ligitajn per salikvergo. Li ĝoje diris al mi: “Mi ne sukcesis kapti grandan fiŝon, ĉar tro malvarma estas la akvo en mateno. Ĉi tiujn fiŝojn mi kaptis ĉe la river-bordo.” Li ridetis al mi, montrante siajn blankajn dentojn kvazaŭ dirante: “Vidu,



En olunĉuna hejmo, fratino helpas sian fraton en lernado.
Foto de Hu Vej

ĉu mi ne estas bona ĉasisteto?” Kaj li kondukis min al sia hejmo. Lia patrino estis flikanta pantalonon per kudromaŝino. Lia patro trinkis lakton sur la hejtlito aŭskultante muzikon el la radiaparato. Vidinte min, li prezentis al mi bovlon da lakto kaj komencis babili kun mi.

La patro de Manda estis estro de la produkta brigado. Li rakontis multajn interesajn anekdotojn de sia ĉasbrigado. Kaj mi aŭskultis tre interese. Dume la sagaca kaj vigla Manda alportis sitelon da *duŝi*-oj. Lia patro elŝutis ilin el la sitelo farita el betulŝelo kaj regalas min per la *duŝi*-oj metitaj en betulŝela bovlo. *Duŝi*-oj aspektas kiel purpuraj sovaĝaj vinberoj kaj gustas dolĉe kaj acide. Manĝante la berojn la patro de Manda rakontis al mi ke en sia juneco, iun matenon, ĵus kiam aperis la suno elpost la monto, li nenion manĝinte iris por kolekti la berojn. En mateno, banataj de roso la *duŝi*-oj estas tre freŝaj kaj sukaj. Li do deŝiris kaj frandadis la berojn, ĝis li fine “ebriiĝis” sur la montodeklivo kaj vekiĝis nur je la tagmezo. La vaste konata vino “Juegju” el Interna Mongolio estas farita ĝuste el tiuj beroj. Adiaŭinte la gemastrojn, mi vidis antaŭ la domo ke Manda ludas “urslukton” kun kelkaj knaboj sur la placo. La olunĉunaj infanoj estas viglaj kaj ludemaj. Mi tre deziris scii ĉu ili estas diligentaj en lernado. Matenmanĝinte mi promenigis al la elementa lernejo ĉe la fino de la vilaĝo. Mi trovis tie instruistaron du-dekelkjaran. Ŝi ordonis al la lernantoj saluti min, kaj tuj nedeteneble eklaŭdis siajn lernantojn antaŭ mi. Inter la lernantoj laŭditaj estis ankaŭ Manda. La instruistino montris al mi la lernotaskojn de la lernantoj. Manda skribis tre bone en sia kajero, kaj lia verkajo estis lingve sufiĉe glata. Liaj ekzercoj preskaŭ ĉiuj ricevis noton “kvin”. Manda ja estas lernema knabo.

† *Sovaĝa besto simila al vulpo.*
‡ *Flago: administra distrikto.*

Kantoj el la Riversudo*

(Poemoj en Prozo)

Vilaĝa Mateno

Mateno. Ŝi trapasas la enirejon de la vilaĝo, portante en mano sitelon da akvo. Ŝiaj delikataj paŝoj disrompas la rosgutojn. Pecetoj de ruĝaj nuboj plenigas la brilan akvon en la sitelo.



**Nova
Kontribuo
de ĉinaj
esperantistoj
al la
esperanta**

literaturo post la

Ĉina Antologio

LUSIN estas konata kiel fondinto de la ĉina moderna literaturo. Liaj noveloj havas altan literaturan valoron kaj socian signifon. Ili estas nepre legindaj por ĉiuj, kiuj volas aprezi la majstrajn verkojn el la ĉina moderna literaturo kaj koni fundamentan fizionomion de Ĉinio antaŭ la Liberiĝo.

La libro enhavanta 29 novelojn estas preskaŭ kompleta kolekto de la noveloj de la aŭtoro. Aldonitaj estas 28 belaj ilustraĵoj, inter kiuj 12 estas koloraj, foto de la aŭtoro, biografia artikolo kaj kronologiaj notoj.

Formato: 13 × 21 cm. 464 plus 12 paĝoj

Prezo: Rb. 1.61, US\$ 1.80, £ 0-12-0,

Gld. 6.75, Steloj 25

Tuj medu ĉe

* Niaj perantoj aŭ

* Nia Administracio (P. O. Kesto 313,
Pekino)

ĈINA ESPERANTO-LIGO

Alvenas junulo, kondukante bovon. Nek dekstre, nek maldekstre, nek rapide, nek malrapide, li baras al ŝi la vojon.

“Ĉu mi povas trinkigi la bovon per via akvo?”

Ŝi haltas. La akvo spegulas du figurojn interproksimiĝantajn.

Eble la bovo ne soifas, eble ĝi estas ja trinkinta; kiam la knabino reportas la sitelon por daŭrigi sian iradon, ŝi sentas, ke la sitelo estas same peza, kaj la akvo, same klara.

Sed en la brila akvo aperas ruĝiĝinta vizaĝo de ridetanta knabino.

La Silkraŭpoj Monton Suriras**

La silkraŭpoj monton suriras, la silkraŭpoj monton suriras.

La dikaj raŭpoj neĝe blankas, bele brilas.

Ha, ĉie radias arĝento, kvazaŭ lunbriloj, filtritaj tra kribrilo, kvazaŭ ŝaŭmoj sur la maro.

Delikataj knabinaj manoj karese prenas la raŭpojn de la verda tapiŝo el morusfolioj, kaj metas ilin sur preparitajn pajlofaskojn.

Tuj eksusuras la tuta ĉambro; sur la ora pajlo pendas silkfadenoj, pure blankaj kvazaŭ strietoj de akvo.

La knabinoj aŭskultas. Kia dolĉa sono! Simila al iliaj delikataj ridoj dum la kolektado de morusfolioj.

Restis trankvilaj la knabinoj. La tuta ĝojo kaj ekstazo transformiĝas en neĝblankajn kokonojn.

Knabino de Meteorologia Stacio

Sube de viaj piedoj flosas la nuboj, supre de via kapo brilas la blua ĉielo; la alaŭdoj estas viaj plej bonaj kunuloj, la vento kaj pluvo faras por vi tualeton.

Ĉiumatene, vi estas la unua, kiu bonvenigas la tagiĝon, hisante flagetojn super la tegmento. Flagetoj ruĝa, blua kaj blanka, ĉiuj reprezentas viajn salutojn al la komunumanoj de la montvilaĝo.

Neniam vi sentas vin soleca, kvankam vi restas sola sur la monto. Rigardu, kiel belas la ĉielo, kiu

(Daŭrigo sur p. 54)

* La riĉa kaj bela landparto de Ĉinio sude de Jangzivero.

** Kiam la silkraŭpoj faras kokonojn, oni kutime diras, ke ili suriras monton.

Ĉinaj Poŝtmarkoj

Pri Antikvaj Sciencistoj de Ĉinio

La 92-a serio de p.m. emisiita (1-XII-1962) de Ĉinio por antikvaj sciencistoj de Ĉinio.

Caj Lun (?-121 p. K.) 1-297 4c.
Paper-farado 2-298 4c.

Li estas la inventinto de la farado de fibra papero. En la antikva Ĉinio oni skribis sur bambuaj pecoj kaj silkaĵo, sed bambuaj pecoj estis tro pezaj kaj silkaĵo tro kara. En 105 p. K. Caj Lun provis fari paperon el arbŝelo, senutila linaĵo, ĉifonaĵo, difektitaj fiŝretoj ktp. kaj sukcesis.



Ŝen Gua (1031-1095 p. K.) 5-301 10c.
Geologio 6-302 10c.



Li estas antikva sciencisto kaj havis profundan konon pri literaturo, arto, natura scienco, tekniko, historio, arkeologio ktp. En sia maljunaĝo li verkis 26 volumojn de *Notoj de Mengki*, ĝiajn 2 kompletigajn volumojn kaj 1 aldonan volumon, kiuj registris liajn vastajn konojn kaj komprenojn en sciencoj. Li iam proponis revizii la kalendaron; difini la monatojn laŭ la sezon-periodoj, ne konsideri la lunfazojn, forigi supermonaton, t. e. apliki sunan kalendaron. En fiziko li unue trovis ke la magneta nadlo ne montras precize al la nordo.

Sun Simiaŭ (581-682 p. K.) 3-299 8c.
Farmacio 4-300 8c.


Li estas fame konata medicinisto kaj farmaciisto. Li studadis medicinon dum sia tuta vivo, vizitis multajn lokojn por kolekti drogojn kaj kuracajn spertojn de la popolo. En 652 p. K. li verkis *Trezorajn Receptojn* en 30 volumoj, kaj en la sekvintaj 30 jaroj li verkis 30 kompletigajn volumojn de la *Trezoraj Receptoj*.




Guo Šouĝing (1231-1316 p. K.) 7-303 20c.
Astronomio 8-304 20c.

Li estas erudicia sciencisto kaj majstro en astronomio, akvomastrumado, geografio ktp. kaj multe kontribuis al ili. Guo Šouĝing estas astronomia observisto kaj specialisto en farado de astronomiaj instrumentoj. *Šouŝi*-kalendaro publikigita de Juan-dinastio en 1281 p. K. estis de li difinita, kaj per tio li havas senmortan meriton en la historio de Ĉinio.

Eburaj Skulptaĵoj de Ĉinio



Krabo-kaĝo




Riĉa rikolto



Dancanta budhino



Elefanto kun elradikita arbo



Pagodo

Gaŭ Han:

Plena Ekspono de Vero

Pri la Dokumenta Filmo "Vero pri la Landlima Problemo Inter Ĉinio kaj Hindio"

"... Alproksimiĝante al iu monteto, ni trovis proksimume ses ĉinojn. Tyagi ordonis min konduki aron da personoj al la dorso de la monteto kaj mem antaŭeniris defronte por sieĝi kaj kapti tiujn ĉinojn. Mi vidis, ke unu-du ĉinoj mansignas al ni ke ni for-tiriĝu, dume la aliaj ĉinoj iris en batalpozicion. La hindaj soldatoj pafis la unuaj.

"... La ĉinaj soldatoj ne estis ekipitaj per mort-tiro aŭ alispecaj pafilegoj.


"... La areoj oriente, sude kaj norde de Kongka-pasejo estas parto de la ĉina teritorio. Mi kaj miaj soldatoj neniam alvenis antaŭe al la loko, kie okazis la batalo. . ."

Jen tiel skribis pri la okazintaĵo Karam Singh, la vickomandanto de la hinda trupo ĉe la landlimo inter Hindio kaj Tibeto, post kiam li estis kaptita en la dua sanga kolizio landlima, okazinta en oktobro 1959. Oni povas vidi la scenon en kiu li skribas la kon-feson, en la dokumenta filmo "Vero pri la Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio". Ĝuste nun en la tempo, kiam la tuta mondo parolas pri la landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio, per feraj faktoj kaj nekontestebla logiko tiu filmo montras, ke la vero ne estas ĉe la flanko de la hinda registaro.

De tri jaroj la hinda ĉefministro Nehru je centoj da fojoj kalumniis Ĉinion per kvalifiko de "impe-riismo", "ekspansiismo", "agresema en sia naturo", "agreso aldone al agreso" ktp. Sed la filmo doku-mentas per jenaj faktoj: La gvidantoj de Ĉinio varme bonvenigas la ĉefministron de Birmo kaj la reĝon de Nepalo, kiuj venas al Pekino, kaj subskribas kun ili la landlimajn traktatojn inter Ĉinio kaj Birmo kaj inter Ĉinio kaj Nepalo, respektive; la starigantoj de limfostoj de Ĉinio kaj Birmo kaj de Ĉinio kaj Nepalo kune starigas limfostojn respektive sur la landlimoj, kune fotigas sin kaj kune drinkas kaj dan-cas, intergratulate unuj al aliaj. La filmo referencas al multaj dokumentoj de la lokaj registaroj de Tibeto kaj Hingiang el fruaj jaroj, al la dokumento sub-skribita de la reprezentantoj de la ĉina kaj hinda registaroj en la jaro 1954, al multaj oficialaj mapoj de Britio kaj Hindio, al la originala mapo pri la kon-traŭleĝa McMahon-linio kaj la mapo de Hindio presita en verko de Nehru mem, por montri ke la areoj kon-

traŭleĝe okupitaj de hindaj trupoj estas senescepte ĉina teritorio. La filmo montras ankaŭ scenojn de marŝado de la Ĉina Popola Liberiga Armeo al Tibeto tra la areo Aksaj Ĉin de Hingiang kaj scenojn de konstruado de Hingiang-Tibeta Vojo. Kaj la hinda registaro tamen arbitre asertas ke la nomita areo apartenas al Hindio.

En somero de 1959 hindaj trupoj transiris la kon-traŭleĝan McMahon-linion, bruligis niajn montar-barojn situantajn norde de la nomita linio, okupis nian teritorion, starigis en Khinzemane sian nacian standardon sur muron, al kiu estas gravurita tibetlingva sutro kaj tiel kaŭzis la unuan sangan landliman kolizion. Kaj oni povas vidi en la filmo ke la reprezentantoj de nia landlima trupo, antaŭ



Supre: Limfostoj estas starigitaj sur la limlinio inter Ĉinio kaj Nepalo.


Sube: La limlinio inter Ĉinio kaj Birmo estas determinita per limfostoj.

問：阿里地區由活不秦河到什布奇的一段西藏土地可否由英政府進行修路，
答：這是西藏的土地，英國政府修路是不行的。



Supre: Hindaj invadintoj ĉe Khinzemane.

Sube: Re prezentantoj de ĉina landlima trupo admonas ilin retiriĝi.



la fumplenaĵoj, brulkalvigitaĵoj en nia teritorio, nur admonis la hindojn retiriĝi. En oktobro samjare, la hinda trupo plie provokis duan sangan kolizion sude de Kongka-pasejo kaj mortigis niajn landlimajn

La hinda registaro asertas ke Ŝipki estas ĝia teritorio, sed en la protokolo pri interparolo inter reprezentantoj de la lokaj aŭtoritatoj de Ĉina Tibeto kaj Britio en la jaro 1934 oni povas legi la jenon:

Brita reprezentanto: Ĉu la brita registaro povus konstrui vojon de Huobusang-rivero ĝis Ŝipki en la tibeta Ari-distrikto?

Tibeta reprezentanto: Tie estas tibeta teritorio kaj estas nepermesible, ke la brita registaro konstruu vojon tie.

gardistojn. En nia devigita rebato ni kaptis ĝian vickomandanton kaj multajn soldatojn. Sed ni ne prenis ilin kiel niajn malamikojn, sed redonis al ili iliajn pafilojn, helpis ilian vickomandanton surĉevaliĝi kaj lasis ilin reiri al sia lando. En la filmo oni povas vidi ke oficiroj kaj soldatoj de nia landlima gvardio adiaŭis ilin kaj la forirantaj hindoj resalutas manleve kun ĝojo. Post kiam ni unuflanke ĉesigis la patroladon ĉe nia flanko laŭ la linio de efektiva kontrolo, nia ĉefministro Ĝoŭ Enlaj ankoraŭ vizitis Novan Delhion, sincere klopodante serĉi vojon al paca solvo de la landlima problemo. Sed en la filmo oni povas vidi ke Nehru ne volas, pro kaŝita celo, solvi la problemon per intertraktado, arbitre kaj militeme postulas ke ni forcedu kun riverencan teritorion kun amplekso proksimuma al kvar Belgioj aŭ dek du Libanoj.

Pri tiu nekomprenebla sinteno de Nehru la filmo donis klarigon per karikaturo el la hinda ĵurnalo *Times of India*, kiu publike konfesas: "La milito kontraŭ Ĉinio igas nian situacion, senprecedence bona." Do estas nemirinde ke la antaŭa ministro de nacia defendo de Hindio Menon persone venis al la landlimo por prepari grandaskalan armitan ofensivon, kaj ke la nova ministro de nacia defendo Chavan kriis pri "longdaŭra milito" kontraŭ

Hinda ĵurnalo kriiĉas pri "totala milito".



Ĉinio, kiam ĉefministro Ĝoŭ Enlaj alvokis la gvidantojn de diversaj aziaj kaj afrikaj landoj subteni justecon kaj instigi al paca solvo de la landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio.

La filmo uzis la teknikon de pentrita filmo por montri simple kaj klare la tre komplikan situacion de la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio kaj ĝian cirkonstancaron historian, reliefigante nian firman strebadon al paca solvo de la problemo, kaj ĝuste pro tiu firma strebado al paco ni gajnis la varman subtenon de la justa publika opinio de la mondo kaj estas optimismaj pri la perspektivo de tiu demando. Ĉar la filmo sukcesis strikte kombini nian politikon kun la filmaj figuroj, kun ampleksa kaj komplika dokumenta materialo kaj kun rigore logika eksplikado, ĝi karakterizas sin per sentima spirito devenanta de justeco, kategoria tono devenanta de praveco kaj profunda sincereco el senmalica koro.

Ĉiu rigardinto de la filmo povas klare vidi, en kiu estas agresinto. Kaj oni povas pli klare vidi, kian flanko estas la vero, kiu estas ekspansiisma, kaj signifon havas por la landlima kolizio inter Ĉinio kaj Hindio, komencita en la 20-a de oktobro 1962, la ofte ripetata diro de ĉefministro Nehru: "liberigi . . . je la ĉinoj".

ESPERANTAJ LIBROJ eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo

- * **La Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio**
(Senpage ricevebla por petantoj sed restas stoko ne granda)
- * **Proletoj de Ĉiuj Landoj Unuiĝu por Oponi Nian Komunan Malamikon** (Rb. 0.09, US\$ 0.10, £0-0-9, Gld. 0.35)
- * **La Malakordoj inter K-do Togliatti kaj Ni**
(Rb. 0.13, US\$0.10 £0-1-0, Gld. 0.50)
- * **Leninismo kaj Moderna Reviziismo** (Rb. 0.06, US\$0.05, £0-0-6, Gld. 0.25)
- * **Ni Unuiĝu sur la Bazo de la Moskva Deklaracio kaj Moskva Deklaro** (Rb. 0.09, US\$ 0.10, £0-0-9, Gld. 0.35)

La 4 lastaj estas aĉeteblaj ankaŭ per
poŝtmarkoj egalvaloraj ĉe

Guozi Shudian, P. O. Box 399, Peking, aŭ
La Administracio de ĈEL, P.O. Kesto 313, Pekino

Li Jeguang:

Pensad' pri Kubo Malproksima

*Jen fajra flam' leviĝas alten, alten
de sur la krest' de Maestra-montaro,
dispafas orajn sagojn en la nokton
kaj brilas super la Kariba Maro.*

*En la fajrlum', heroa Kubo staras
brilanta kun mieno de kolero,
simile al l' orluma sun' matena
el la ondar' de l' Okcidenta Duonsfero.*

*Leviĝas jen falĉiloj neĝer-nombraj!
Tra kampoj de tabak' kaj sukerkanoj,
jen la falĉiloj dancas, fulme brilas,
simile al arĝentaj uraganoj.*

*Milicaninoj kun kaptuk' kolora
kaj milicanoj, barbaj milicanoj,
kun kap' levita kaj okuloj larĝaj,
ameme ĝisrevidas al kabanoj.*

*Por bonvenigo de l' printempo kvina,
la aĝaj sortospitaj kamparanoj
ne kisas teron en manplatoj siaj,
sed ferajn pugojn faras el la manoj.*

*Geknaboj, ho, similaj al la floroj,
kun ladskatol' enmane, kun tintbruo,
akceptas, ĉe stratfinoj kaj vojrandoj.*

monerojn por Patri' en sankta kontribuo.

*Ĉu la lernejoj novfonditaj jam ekiras?
kaj via nova riz' bongustas, bonodoras?
Ĉu la klubej-fenestroj lumas plu tra l' nokto?
Kaj l' somer-urboj same per tostado bolas?*

*Ho, Kubo, dum la brilaj jaroj viaj
jam kiom kantis mi pri via gloro;
subite sonas jen surdiga tondro,
nun kiel ardas zorg' pri vi en mia koro!*

*Ĉu Dules vere mortis kun intrigoj siaj?
Ĉu Ike vere jam sin kaŝis kun la ŝvela vango?
Kennedy jen per nigra man' de l' Blanka Domo
ekpuŝas Kubon al la front' de fajr' kaj sango!*

*Do, Kubo, same kiel sur Kiron-marbordo,
frakosas certe la kapaĉojn de la lupoj.
Vi tenu nun pli alte l' sanktan justan torĉon
kaj l' lastan Amerik-karceron faru ruboj.*

*Jen justa flam' leviĝas alten, alten
ĉe l' horizonto tre tre malproksima.*

*Ĝi brilas ĝis la vasta ĉina tero
kaj ekbruliĝas mia kora pens' senlima.*

Trad. Laŭlum

La Popola Komunumo Forigis la Minacon de Granda Dezerto

DANK' al la akvomastroma konstruado fare de la popolaj komunumoj, la subprovinco Hetian, kiu situas kiel verda rubando 600 kilometrojn longa fronte al la granda Taklamagan-dezerto, plialtigis sian grenprodukton, en la lastaj kvar jaroj meznombro je 15% ĉiujare ol en 1957.

Ĉe la suda bordo de la plej granda dezerto de Ĉinio, la sep gubernioj, kiuj apartenas al Hetian, estas unu el la plej sekaj regionoj de la lando. Tie la jara pluvokvanto ne atingas meznombro 40 milimetrojn, dum la vaporiĝo superis pli ol 50 oblojn de tiu cifero. La subprovinco estas serioze minacata de la suden disvolviĝanta Taklamagan-dezerto. Ĝiaj kampoj estas irigaciataj de tri riveroj kaj kelkaj riveretoj, formiĝintaj el la neĝakvo de sur Kunlun-montaro. Tamen, la riveroj kaj riveretoj plejparte elsekiĝas dum pli ol duono de la jaro. Kiam la neĝo grandkvante degelas, ili entenas pli ol 70% de la tutjara akvokvanto. Sed nur parteto de la akvo estis utiligata por la kampoj, dum pli ol 70 procentoj rapide perdiĝas en la dezerto. Tial, multaj ujuguraj kamparanoj povis irigacii la kampojn nur en la periodo de akvoleviĝo, de junio ĝis aŭgusto, kiu permesis la semadon de malfrua maizo. La produktokvanto estis malgranda, kaj la loĝantoj vivis tie tre malfacile.



Post la fondiĝo de popolaj komunumoj, kolektiva forto transformis ĉi-tiun apuddezertan regionon en unu el la lokoj kun plej multaj rondŝtonaj kanaloj.

La tuta subprovinco estas kovrita per reto da akvokonservejoj kaj kanaloj. La areo de ĝia kulturita tero pligrandiĝis je 69% kompare kun tiu de la jaro de la Liberiĝo. Nun, anstataŭ esti regiono kiu ne produktas sufiĉajn grenojn por sia propra konsumo, ĝi havas superabundajn kaj povas liveri grenojn al aliaj regionoj, al kiuj ili mankas.

Ĉi tiu el sep gubernioj konsistanta verda oazo, etendiĝanta sude de Taklamagan-dezerto, estas disigita de multaj gobioj. Estas malfacile konstrui kanalojn en la gobioj, sed la lokaj ujuguraj komunumoj elpensis la metodon utiligi rondŝtonojn de la gobioj por konstrui kanalojn, kaj tiel solvis la problemon de trafluetado de la akvo. Ili pavimis la fundon kaj la du internajn flankojn de la kanaloj per tavolo da rondŝtonoj kun diametro de 20 centimetroj. La rondŝtonaj kanaloj bonefike malebligas la trafiltiriĝon kaj lasas flui al la kampoj pli ol 70% de la akvo, kiun ili entenas. La kanaloj, kies fluorapideco superas 6 metrojn posekunde, bezonas rondŝtonojn kun diametro de 50-80 centimetroj, kaj la fendoj inter tiuj grandaj rondŝtonoj estas ŝtopitaj per malgrandaj. Hodiaŭ, la tuta subprovinco havas pli ol dudek rondŝtonajn kanalojn, kiuj longas entute pli ol 360 kilometrojn, kaj el kiuj la plej granda fluigas 100 kubometrojn posekunde. Tie, kie ne estas gobioj, la komunumanoj konstruis 68 terajn kanalojn,

Por venki la grandan dezerton Taklamagan, sciencaj laborantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj faras esploradon en tiu "neelireblejo".

La irigacia kanalo Antaŭensalto de Keŝi povas irigacii 1,200,000 muojn da tero de 40 popolkomunumoj.



kun tuta longeco de pli ol 1,200 kilometroj. La rondŝtonaj kaj teraj kanaloj, ĉu en periodo de inundado kaj akvoleviĝo, ĉu en periodo de akvomalleviĝo, povas konduki la akvon el la riveroj en la kampojn. En la malaltaj terenoj ĉe ambaŭ bordoj de la riveroj, la popolaj komunumoj konstruis 38 akvokonservejojn por konservi la superfluan akvon dum la akvoleviĝo, kun la celo ĝin uzi dum la malleviĝo. La akvokonservejoj estas plejparte malgrandaj, el kiuj la plej granda havas kapaciton de tridek milionoj da kubometroj.

Krome, la tieaj ujuguraj kamparanoj pligrandigas la areon de kulturita tero kaj kulturita vintrano tritikon, enkondukitan el aliaj regionoj, kiu estas ĝenerale pli altprodukta ol la printempa tritiko. Nun, dank' al la irigacio, eblas semji vintrano tritikon ankaŭ dum la periodo de akvomalleviĝo de la riveroj. En la pasinteco oni kulturis tie nur printempan tritikon, sed nun la areo prisemita per vintrano tritiko superis 50% de la tritikaj kampoj de la tuta subprovinco. Plie, oni enkondukis novajn specojn de kotono kaj maizo. Sukerbeto, batato, arakido kaj multaj aliaj legomoj, kiuj ne ekzistis en Hetian, nun bone kreskas ĉi tie.

Kune kun la akvomastroma konstruado, la popolaj komunumoj plantas ĉiujare ĉe la limo de Taklamagan-dezerto, 1,000-2,000 muojn* da arboj kaj arbustoj, el kiuj la unuaj, altaj kaj profunde enradikiĝantaj, povas redukti la rapidecon de la vento, kaj la lastaj, malaltaj kun radiketoj vaste disetendiĝantaj, povas fiksi la moviĝantan sablon. La lokaj ujuguraj loĝantoj delonge kutimas planti fruktarbojn kaj morusarbojn por rezisti kontraŭ la vento kaj moviĝanta sablo. Tial, ĉi tiu regiono estas arboplena, kaj fariĝis fama produktaĵo de fruktoj en Hingiang. Ĝi riĉe produktas vinberojn, juglandojn, abrikotojn, persikojn kaj pli ol dek specojn da melonoj.

* 1 muo = 1/15 hektaro.



Kamparanoj de Piŝan-gubernio diras al forstokulturaj teknikistoj kiel ili sukcesis konstrui forstozonojn.
Foto de Min Kĵuanfu

La akvorezervejo Antaŭensalto konstruita de popolkomunumo en Piŝan-gubernio por venki la trosekecon en dezerto.
Foto de Min Kĵuanfu



Bruligu Bivakfajron Nian

— Popolkanto de Olunĉunoj —

En printempo de 1928, dek kelkaj gejunuloj de la olunĉuna nacio en Huma-gubernio, kolektive fuĝis en montaron por kontraŭstari la malracian geedzigan sistemon de tiu nacio. Tiu okazajo famiĝis en la nacia historio de la olunĉunoj sub la nomo "Fuĝo sur la Monton". Veninte en la montaron, la gejunuloj suferis mankon de kugloj kaj salo kaj vivis tre mizere. Sed ju pli malfacila estis la vivo, des pli arde sonis ilia kanto.

Bruligu bivakfajron nian,
Bruligu bivakfajron nian,
Boligu en pendpot' niajn kantojn melodiajn!
Boligu en pendpot' niajn kantojn melodiajn!

Ne lasu larmon flui,
Ne lasu larmon flui,
Ĝi restu enstomake, ĉar larmo estas sala,
— En-monta nia vago ja devos longe plui.

Gi Ĝiguang
kaj
Ĝaŭ Kuangjen:

Senvelkaj Floroj

LA floro el papirifero* estas unu el la kvin famaj specialaj metiartajoj de Jang-ĝou**. Ĉar ĝi estis uzata en la pasinteco ĉefe kiel harornamaĵo por virinoj, tial ĝi havis la tradician nomon de har-ornama floro. Sed dum la lastaj jaroj, dank' al la genia kreado de metiartisto Kian Hongcaj, ĝi jam de simpla harornamaĵo fariĝis artaĵo altvalora.

Rigardu la belan floron en la foto†: Ĉu ĝi havas ian diferencon ol la naturaj floroj? Tamen, ĝi estas nur artefarita floro el tre simplaj materialoj kiaj papirifero, papero, farbo kaj dratoj. Ĝi ne nur estas tiel viveca, versimila kaj ĉarma kiel la naturaj floroj, sed ankaŭ superas la lastajn per senvelkeco.

La farado de papirifera floro estas tre delikata laboro. La suk-

ceso de Kian Hongcaj en tiu metiarto ja ne estas hazarde akirita.

En sia infanaĝo Kian Hongcaj jam tre amis florojn kaj ŝatis planti arbetojn kaj bredi birdojn. Por observi sovaĝajn florojn, li povis stari kelkajn horojn senmova kaj ofte prenis specimenojn kun si por daŭrigi la ĝuon hejme. Oni mokis lin pro tia "stultajo", tamen tio ja formis la fundamenton de lia artkreado.

La patro de Kian Hongcaj estis metiisto de harornamaj floroj. Kiam Kian Hongcaj estis 15-jara, pro la malfacileco en vivtenado de sia familio, li estis devigita forlasi lernejon kaj eklaboris en la hejmo por helpi al la patro super florfarado. Li tre ŝatis tiun metion. Krom lerni ĉe la patro, li ofte iris al la metiejoj de aliaj florfaristoj por observi ilin en florfarado, ofte tiel absorbite ke li forgesis eĉ tagmanĝon. Tiel li faris sufiĉe longe kaj oni ekkomprenis ke li venis por ŝtele lerni la metiarton, kaj lin forpelis kun insulto kiam li denove alvenis. Sed tio neniel deprimis lin de la vojo lerni la metiarton.

Tiam la metiistoj faris nur tre simplajn harornamajn florojn kun formoj elpensitaj, en buntaj



Kian Hongcaj

koloroj. Ili estis okulplaĉaj sed ne versimilaj. En festaj tagoj, precipe en la Novjara Tago laŭ ĉina luna kalendaro, tiaj floroj estis rapide disvendigis. Sed en aliaj sezonoj, Kian Hongcaj devis

* *Tetrapanax papyrifera*.

** La ceteraj kvar estas la glazurita lanterno, la velura floro, la lakaĵo kaj la papertranĉaĵo. Pri la lasta oni legu la artikolon de la samaj aŭtoroj en EPC n-ro 5 p. 212 (1962j.).

† Kaj rigardu la fotojn sur p. 20 de n-ro 1/1958 de EPC.

Ne lasu larmon fali,
 Ne lasu larmon fali,
 Similas ĝi ja fajron, ĝi ŝargu la pafilon!
 Kun la sovaĝaj bestoj ja devas ni batali!

La disponigon de la spiro nia
 Gepatroj nomas vivodono.
 Ĉu vivo estas nur afero tia?
 Ho, ne! Duono, nur duono!

Gepatran entombigon ne povos ni soleni,
 Ĉar ni ne volas lasi la koron plu kateni.
 Ni fuĝis de la tribo sur la monton
 Por gajni la tutecan viv-estonton!

La cervan liberecon ni preferas,
 Kvankam malsaton kaj tim-kuron ĝi suferas;


Ni estu alaŭdetoj kaj flugu kun kanttrilo,
 Alfrontu pafon, morton kantante en jubilo.

Ĉu devas ni jam morti aŭ plu ekzisti vive,
 Ni tion faru ĉiam nur kune, kolektive!
 Ne timu ke nin oni ĉasados kiel beston,
 Ja nia granda ĉuolo* Hing'an-montaro restos!

Bruligu bivakfajron nian,
 Bruligu bivakfajron nian,
 Boligu en pendpot' niajn kantojn melodiajn!
 Boligu en pendpot' niajn kantojn melodiajn!

* Ĉuolo — tendo el ledo kun pinta tegmento, uzata de olunĉunaj nomadoj kiel loĝejo.


Kolektis **Ma Li**
 Trad. **Laŭlum**



Krizantemoj



Kamelio



Kalikanto

kaj tiuj novtipaj floroj ricevis bonan takson de la rigardantoj. Sed li ne kontentiĝis. Li pensis, kiom bone estus se la naturaj floroj povus esti konservataj tiel ke ili neniam velku! Li prove

versimilaj, li estis treege okupata dum kelkaj vesperoj. Li faris muldilon el briko, faris kopiaĵon el papirifero kaj ĝin atente perfektigis. Sed la floro tiel farita havis nur stamenon sed ne kalikon, ĝiaj koloroj estis sennuancaj kaj branĉoj rigidaĵ. Por forigi tiujn mankojn li faris pli ol dek potojn da floroj, sed la rezulto ankoraŭ ne estis kontentiga. Li humile petis instruon de ĝardenistoj kaj sekciis verajn florojn por detale esplori ĝian struk-

kolporti siajn florojn en malproksimaj urbetoj kaj vilaĝoj. Ĉar la gajno tute ne sufiĉis por vivteni la familion, Kian Hongcaj devis, pli poste, forlasi tiun metion kaj fariĝi detalvendisto.

Nur post la Liberiĝo de nia lando rejuniĝis lia metiarto. En 1951, kiam en Jangĝou-subprovinco okazis Foiro por Interŝanĝo de Produktajoj inter Urboj kaj Vilaĝoj de Norda Giangsu-provinco, Kian Hongcaj sendis al la foiro kelkajn harornamajn florojn kiujn li kuraĝe renovigis

trepis freŝajn florojn en alkoholon. Tamen malsukcesis la provo. Do li sin turnis al imitfarado de potfloroj per papiriferoj. Pruntinte de lia amiko poton da krizantemo, li ĝin observadis, studadis kaj ekfaris kopion imite al la vera floro. Por ke la vejnoj sur la folioj estu

turon. Li refaris muldilojn el vakso kaj klopodis vivecigi sian kreaĵon per uzo de laktolo, alkoholo kaj artefarita lakto. Post pli ol 40 fojoj da malsukcesoj fine li kreis la rimedon de florfarado per gipsa muldilo. Floroj kun petaloj kiel ajn longaj, kur-baj kaj larĝaj povas esti per tiu rimedo artefarita viveca kun delikataj vejnoj sur la folioj. Lia unua artefarita krizantemo estis nomata "Ebria Belulino", kiu vere meritas tiun nomon per sia ega simileco. La karmina floro sin prezentas tiel delikata, svelta, milda kaj gracia. Ĝiaj petaloj kvazaŭ balancas en zefiro kaj ĝi kapklinas kvazaŭ ebriiĝinta belulino. Tiu florkopiaĵo estis sendita kune kun la natura floro al la Ligo de Artistoj kaj Literaturistoj por ekspertizado kaj la laborantoj de la Ligo ĉiuj ne povis distingi kiu el ili estas la vera floro. Poste ĝi estis elmontrata en la Ekspozicio de Krizantemoj kune kun veraj floroj. Ankaŭ neniu el la vizitantoj povis rimarki ke tiu floro estas artefarita.

Kvankam Kian Hongcaj akiris sukcesojn, tamen li ne kontentis pri siaj atingaĵoj. Li trovis ke, kvankam la foliaro jam estas farita tiel verda en koloro, tamen ĝi estas ne tiel brila kiel la vera. Kaj li faris multe da novaj provoj. Li ŝmiris vakson sur la folioj por ke ili estu glaceaj. Sed ili estas malhelaj se oni lasis la vakson nature sekiĝi kaj ili estis tro brilaj se la folioj estis trempitaj en akvo. Fine li ricevis taŭgan glaceon sekiginte la vakson per spirblovo. En kreado Kian Hongcaj estas ĉiam tiel pacienca kaj serioza. Li faris ankaŭ vazon da kalikanto (*calicanthus praecox*), sur kiu li ŝmiris iom da aromajo. Kiam la artefarita floro estis montrita en la Ekspozicio de Belartaj Verkoj de Giangsu-provinco, multe da vizitantoj ĝin rigardis kaj flaris ree kaj ree, ne povante diferencigi la artefaritan floron de la natura. Per la vortoj "pli viveca ol la natura" oni esprimis sian admiron al la arto de Kian Hongcaj. Lia verko vere estas natursimila kaj ĉarma kaj tiradas

al si aprezantojn kiel forta magneto.

Kian Hongcaj plej lertas en faro de kamelio, magnolio, printempa umefloro, peonio, ĉina rozo, narciso k.a. Liaj verkoj estis senditaj al la Ekspozicio de Plastica Arto de Socialismaj Landoj en Moskvo kaj al la Internacia Foiro en Lejpozigo. Ĉiujare en la Foiro de Kantono liaj verkoj estas rekomenditaj al eksterlandoj kaj ricevas multe da mendoj. Nun liaj verkoj ĝuas grandan internacian famon kaj donita jam estas malfacile plenumi ĉiujn mendojn. Oni ŝatas la verkojn de Kian Hongcaj, ĉar ili povas servi ne nur kiel artaĵoj por ĝuo, ornamo aŭ dekoracio, sed ankaŭ povas esti modeloj por pentrado en ĉiu ajn sezono; kaj li povas liveri ĉian floron laŭdezire. Nun li okupas sin per farado de *ĉiung*-floro*, kiu estas fama jam de antikveco.

En ĉina historio, la imperiestro Jangdi de Suj-dinastio (581 - 619 p. K.) speciale konstruigis la Grandan Kanalon por veturi al

Vortoj de Gingĉen
Bildoj de Je Feng

Bildoj pri Antikvaj Dancoj de Ĉinio

La ĉina dancarto kiu havas sian nacian tradicion kaj originalan stilon, estas evoluinta el multaj dancoj de la antikva Ĉinio. Kvankam tiuj dancoj jam ne plu estas prezentablaj pro perdiĝo de necesaj referencaj materialoj, tamen dank' al la figuroj trovitaj en antikvaj libroj kaj sur kulturaj objektoj, oni povas ankoraŭ vidi postsignojn de la evolado kaj tradicio de la ĉinaj antikvaj dancoj. En skriboj sur testudaĵo kaj bestosto antaŭ la 12-a jarcento a. K. jam troviĝis la vorto "danco", skribita kiel 舞, kiu montras hieroglifon ke unu homo dancas kun du bovovostoj. Pli multaj materialoj pri dancmovoj de la antikva Ĉinio estis trovitaj el la periodo post la 5-a jarcento a. K. Nun ni prezentu al niaj legantoj kelkajn bildojn pri la tipaj el tiuj dancmovoj laŭ kronika ordo.

El la Epoko de Militantaj
Regnoj (403 — 221 a. K.)



1. Sorĉista danco de Ĉu-regno. Kopio de bildo sur la muzika instrumento "Seo" elterigita el tombo de Ĉu-regno, en Hinjang, Henan-provinco.

Jangĝoŭ por rigardi ĉiung-floron sed li ne sukcesis ĝin vidi. Lastatempe disfamis denove, tio ke ĉiung-floro disfloris en Jangĝoŭ. Multaj homoj alveturis de aliaj lokoj por ĝin vidi. Sed, bedaŭrinde, la bela floro floras nelonge, la malfruiĝintoj ne havis la feliĉon vidi ĝin. Tial Kian Hongcaj decidis fari poton da ĉiung-floro por kontentigi la rigardantojn.

En la Giangsu-provinca Salono de la Popola Halo en Pekino, apud veraj floroj staras kelke da artefaritaj de Kian Hongcaj. Kompreneble, tiuj artefaritaj floroj ne bezonas esti akvumitaj. Sed, iutage, la laboranto de tiu salono estis kritikita de kolegoj de aliaj salonoj, kiuj diris: "Kiom malzorgema vi estas! Vi akvumis la aliajn florojn sed kial ne ĉi tiujn?" Ankaŭ ili prenis la artefaritajn florojn por naturaj!

Estas pli salutinde, ke lia arto jam estas aplikata por helpi instruadon. Li faris por la Agro-

nomia Instituto de Norda Giangsu-provinco kvar seriojn da specimenoj de kotono kaj modelon de kotono pligrandigita je 25 obloj. La modelo estas malmuntebla je petaloj, stameno, pistilo k. s. por observado de lernantoj kaj pro tio ricevis altan takson de profesoroj. La Administracio de Ĝardenoj de Hangĝoŭ kaj la Muzeo de Ĝegian-provinco invitis lin helpi en farado de grandtipa modelo de pitoreska Okcidenta Lago. Lastatempe li intencas arte fari specimenojn koncerne agrikulturon por helpi al agronomia instruado kaj agrikultura produktado. Ĉar Kian Hongcaj estas diligenta en studo, entuziasma kaj sindonema en laboro, amanta sian metiartan produktojn kiel hejmon, nun li fariĝis popola reprezentanto de Jangĝoŭ, membro de la Ligo de Artistoj kaj Literaturistoj de Giangsu-provinco, kaj de la Ligo de Ĉinaj Artistoj. En 1956 li estis elektita kiel aktiva laboranto kaj reprezentanto de la Tutlanda Kon-



Krizantemoj

ferenco de Representantoj de Aktivaj Laborantoj kaj reprezentanto de la Tutlanda Konferenco de Representantoj de Metiartistoj kiu okazis en Pekino, 1957.

**Rara vegetaĵo kun grandaj floroj, flavetaj kaj bonodoraj.*



2. Ĉu-a danco. Kopio de bildo sur lakita tualeta kesto elterigita ĉe Ĉangŝa, Hunan-provinco.



3. Bildo laŭ skulptita jadornaĵo.



4. Danco por amuzi aristokratojn.

La Elfosado de Ĉefurbo Hianjang de Kin-dinastio

EKVETURINTE de Hi-an per vagonaro, en malpli ol unu kaj duona horo, mi atingis malgrandan stacion nomatan Ĉangling. Elvagoniĝinte, per ekrigardo sur alta loko, mi trovis ke ĉie sur la ebenejo kreskas plantaĵoj kaj ĉirkaŭe staras disaj vilaĝoj. Jen estas la loko de antikva ĉefurbo Hianjang, trovita de la Arkeologia Instituto de la Akademio de Socioscienco de Ŝenhi-provinco. Antaŭ tio la preciza situo de Hianjan restis enigmo, ĉar neniu historia literaturo donis sufiĉan indikon.

Trimonata Brulego en Hianjang

Antaŭ pli ol du mil jaroj, kiam post la engluto de la ses restantaj regnoj la Unua Imperiestro de Kin-dinastio (221—206 a. K.) unuigis la landon, Hianjang fariĝis la politika, ekonomia kaj kultura centro de Ĉinio.

Hianjang siatempe situis en la centro de la teritorio okupita de Kin-dinastio. La tero tie estas ebena kaj en la sudo estas Vej-rivero, en kies suda flanko konstruiĝis en pli posta tempo la mondfama antikva ĉefurbo Ĉang-an; en la norda parto estas vasta ebenaĵo kiun limas la ondanta montaro Giuzong;

oriente, fore je dek kelkaj km. fluas la rivero Gingsuj, kiu kuniĝas malsupre kun Vej-rivero en granda fluo; sudokcidente, je dek km. fore troviĝas la nuna Hianjang, urbo moderna. En la regiono ne nur abundas agroproduktaĵoj sed estas ankaŭ oportunaj kondiĉoj por trafiko, do ĝi estas vere riĉa kaj bona loko.

Laŭ historia literaturo, en la periodo de la Dua Imperiestro de Kin-dinastio, tra la tuta lando eksplodis grandskala ribelo de kamparanoj. Kiam Hiang Ju konkeris la ĉefurbon, li bruligis ĉiujn palacojn. La brulego daŭris tri monatojn, kaj la prospera urbo kaj pompaj palacoj cindriĝis.

Malkovro de la Antikva Urbo

Ĝis la Liberiĝo la arkeologia laboro pri Kin-dinastio restis preskaŭ nulo. En aŭtuno de 1959, senditoj de la Arkeologia Instituto de la Akademio de Socioscienco de Ŝenhi-provinco komencis esplori kaj viziti la regionon de la nuna Hianjang, sed nenion atingis. Poste, la arkeologiaj laborantoj trovis sur la krutaĵo ĉe la norda bordo de Vej-rivero iom da fajencaj kaj tegolaj fragmentoj, pri kiuj ili siatempe

El Han-dinastio
(206 a.K. — 220 p.K.)




5. Danco de nacimalplimulto en la sudokcidenta Ĉinio, bildo laŭ figuro de pendornamaĵo, elterigita el tombaro ĉe Gin-ning, Junnan-provinco.



6. Bildo laŭ figuro de bronza dancisto elterigita ĉe Gin-ning.



Restaĵo de subtera akvokondukilo



Postsigno de puto

ne povis determini al kiu dinastio ili apartenas. Sed la arkeologiaj laborantoj plurfoje esploris kaj vizitis vilaĝojn en la ĉirkaŭo. Laŭ tieaj kamparanoj, ĉiujare de junio ĝis aŭgusto kiam Vej-rivero ŝvelis kaj mordis la bordon, ofte elteriĝis grandaj potoj, vazoj kaj aliaj objektoj kun strangaj formoj, sur kiuj iafoje troviĝas nekonataj skribaĵoj.

Laŭ tiu ĉi spuro, en 1960 la Arkeologia Instituto tien ekspedis kampan laborgrupon por fari detalan eksploron kaj akiris multe da gravaj kulturaj objektoj. En 1961, la arkeologiaj laborantoj definitive komencis

elfosi la ruinojn de Hianjang. Laŭ la nuna provizora determino ĝia ĝusta loko devas esti en la ĉirkaŭaĵo de la stacidomo de Ĉangling 20 liojn nordoriente de la nuna Hianjang. Kvankam kelkaj partoj de la ruino estas jam formorditaj de Vej-rivero, sed en "la norda deklivo" oni trovis parton de muro el batsolidigita tero kaj dek du postrestintajn konstrufundamentojn. Laŭ historia literaturo, kiam la Unua Imperiestro de Kin-dinastio konkeris la ĉefurbon de iu regno, li senescepte ordonis konstrui por si laŭ tiea palaco kopiaĵon sur "la norda deklivo". Laŭ la trovitaj restaĵoj oni



(La sama, vidate de antaŭe)



7. Bildo laŭ dancista figuro elterigita ĉe Luojang, Henan-provinco.




8. Tambura danco.

konjektas ke tie estis la loko por kopiitaj palacoj de la ses regnoj, kvankam ankoraŭ mankas sufiĉe da atestaĵoj. Laŭ la fajencobakfornoj, fajencaĵoj kaj fajencmetiaj instrumentoj elterigitaj ĉe la vilaĝo Tanmaŭ sude de la stacidomo, tie devis esti siatempe metiejo de fajencofarado.

Antikvaj Objektoj Trovitaj ĉe la Riverbordo

Pro la mordado de ondegoj, la norda bordo de Vej-rivero multe disfalis, kaj grandnombraj subteraj kulturobjektoj estis forportitaj de la fluo. Nun en la tereno, etendiĝanta suden ĝis la bordo de Vej-rivero kaj norden ĝis sur "la norda deklivo", kun larĝo de pli ol dek lioj kaj longeco de pli ol dudek lioj de oriento ĝis okcidento, ĉie oni trovis kulturajn postrestaĵojn: muroj el batsolidigita tero, domfundamentoj, putoj, subtera akvofluejo, keloj, fajencobakfornoj, fajencaĵoj, feraj kaj bronzaĵoj, armiloj, moneroj. . . Plej multe da tiaj postrestaĵoj oni trovis ĉe la demordita krutaĵo de la riverbordo. Arkeologiaj laborantoj fosis en tiu parto pli ol cent kvadratajn metrojn, kaj fos-esploris kvar putojn kaj unu fajencobakfornon kun multe da postrestaĵoj.



Fajencaĵoj elterigitaj ĉe la sidejo de la antikva ĉefurbo de Kin-dinastio.

La Pompa Konstruaĵo el Kin-dinastio

El la dekdu konstruaj fundamentoj elfositaj, du estas tre grandaj, kun alteco de dudek futoj super la tersurfaco kaj perimetro longa de preskaŭ ducent futoj. Unu el ili lokiĝas en la oriento, nordokcidente

de Niujang-vilaĝo, kaj la alia en la okcidento, nord-oriente de Sajgiagoŭ. Ili distancas unu de la alia ĉirkaŭ ducent paŝojn. Kaj en la okcidenta flanko de la konstrua fundamento en la nordokcidento de



9. Danco kun silkaj rubandoj laŭ bildo sur briko elterigita ĉe Ĉengdu, Siĉuan-provinco.



10. Kopio de bildo sur briko elterigita ĉe Peng-gubernio, Siĉuan-provinco.



11. Bildo laŭ dancista figuro elterigita ĉe Meng-gubernio, Henan-provinco.

Niujang-vilaĝo, oni trovis ruinon de du forbruligitaj ĉambroj; kaj unuafoje trovis murpentraĵon el Kin-dinastio. Ĝi estas farita per koloroj ruĝa, flava, blua kaj nigra, sed bedaŭrinde pro paso de longa tempo, la pentraĵoj jam estas difektitaj. La ĉambroj estis konstruitaj el brikoj nebakitaj kaj brikoj kun reliefaĵ desegnoj, la murojn oni stukis per subtila tero miksitaj kun herbocindro, kaj poste ŝmiris ĝin maldike per kalko. En la ĉambroj oni trovis ankaŭ bestovizaĝojn orumitajn, feran najlon. . .

La Edikto-tabuleto pri Unuecigo de Mezurunuoj

En la norda flanko de la stacidomo de Ĉangling oni elfosis ĉirkaŭ mil sescent ĝinojn da bronzaĵ kaj feraj objektoj. Inter ili la plej rimarkinda estas edikto-tabuleto de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio pri unuecigo de mezurunuoj en la tuta lando. La formato de la kvarangula tabuleto estas malpli granda ol manplato, surhavanta tre klaran skribadon: "En la jaro 26-a (t.e. 221 a.K.) kiam la Imperiestro unuigis la tutan landon, la popolo jam vivas en paco, li ektitolis sin Imperiestro kaj ordonis la ĉefministrojn (Vej) Ĝuang kaj (Vang) Van unuecigi la normojn de mezurunuoj, kiuj estas ne unuecaj kaj dubindaj." La surskribado de la edikto-tabuleto kongruas kun la historia registro kaj estas farita laŭ la skribstilo de Kin. En la malantaŭa flanko de la tabuleto ĉe la kvar anguloj sin trovas po unu elstarajo malgranda kiel fazeolo, por ke oni povu alfiksi ĝin sur iun ujon.

Supozeble, tiutempe oni tiel anoncis ordonojn kiel nuntempe per afiŝoj. En la periodo de Suj-dinastio oni elfosis pezilojn de pesilo el Kin-dinastio kaj sur ili trovis ankaŭ la nomojn de la ĉefministroj Vej Ĝuang kaj Vang Van, el tio oni povas konkludi ke ĉiuj mezuriloj tiutempe devis esti faritaj kaj kontrolitaj de la aŭtoritatuloj laŭ la edikto kaj neniu privata persono rajtis ilin fari laŭvole.



Antikva Puto Malsama ol la Nuna

Je ĉirkaŭ unu lio sude de Ĉangling-stacidomo estas Vej-rivero. Ĉi tie sin trovas multe da pri-fositaj putoj el Kin-dinastio, kun interspaco de ne pli ol dekkelkaj paŝoj; kelkaj el ili kun distanco nur de tri aŭ kvar paŝoj, kaj troviĝas eĉ du putoj kunligitaj. Bedaŭrinde pro la riverfluo multe da antikvaj putoj estis neniigitaj. La aperturoj de la putoj, aŭ kvadrataj aŭ rondaj, estas konstruitaj el fajencpecoj



12. Danco kun 7 tereloj. Laŭ bildo elterigita el la tombo de Han-dinastio ĉe Jinan, Ŝandong-provinco.



13. Bildo laŭ dancista figuro elterigita ĉe Luoĵang.

kaj tegoloj, iuj el ili estis faritaj el briketoj; kaj ĉe la suba parto estas putringoj vicigitaj unu sur alia. La interno de la putringoj estas ornamita per punktoj, ekstere per desegno de oblikva ŝnuro. Ŝajnas ke la antikvuloj volas bele ornami ankaŭ la putojn. La putoj havas diferencajn diametrojn kiuj varias inter du kaj kvar futoj. La profundececo de la putoj ankaŭ estis varia, kelkaj el ili havas profundecon de la alto de homo, iuj de du aŭ eĉ tri homoj. Interne la putoj pleniĝis je koto kaj disrompitaj pecoj de fajencaĵoj, tegoloj, ktp. La arkeologiaj laborantoj konjektas ke oni alfiksis ringojn por ke la putoj ne estu ŝtopitaj de fluanta subtila sablo, kia abundas ĉi tie sub la tero. Tia aranĝo de la antikvuloj en putokonstruado estas rimarkinda.

Sagpintoj, Moneroj k.a.

Sude de Ĉangling-stacidomo la arkeologiaj laborantoj trovis ankaŭ nombron da bronzaĵoj, el kiuj estas produktiloj kiel plugpioĉoj, segiloj; armiloj kiel arbalestoj, spadoj, lancoj, halebardoj, sagpintoj; ĉiutagaj uzajoj kiel pelvoj, speguloj, kruĉoj, *ding*-oj (tripiedaj vazoj), *moŭ*-oj (speco de kaldrono), ĉerpiloj kaj zonhokoj, bronzaĵoj sonoriloj, *puŝoŭ*-oj (ringoteniloj sur pordklapoj), bronzaĵoj ringoj, ornamaĵoj por veturiloj kaj ĉevaloj, moneroj, sigeliloj ktp. De la elterigitaj sagpintoj estas pli ol dek specoj en diversaj formoj: plataj, tritrancaj, kun variaj grandeco kaj longeco,

ĉiuj estas tre akraj. Ankaŭ la elterigitaj zonhokoj havas ĉirkaŭ dek formojn, ornamitajn per birdoj, leporoj, cervoj, simioj kaj aliaj bestoj aŭ belaj desegnoj. El moneroj, krom la duon-*liang*-aj* de Kin-dinastio, oni ankaŭ trovis glavformajn monerojn, tolmonerojn (speco de moneroj nomataj toloj), bronzaĵojn konkojn (speco de moneroj) de diversaj regnoj. Plejparto de la moneroj surhavas skribaĵon. El la bronzaĵoj konkoj de Ĉu-regno, la plejmulto estas tiuj de la t.n. "diabla vizaĝo", kaj estas unu rara peco kun la vorto "reĝo" kaj alia kun "oro". La Unua Imperiestro, konkerinte la ses regnoj, unuigis ankaŭ la moneristemon kaj cirkuligis du specojn de moneroj: li nomis la orajn, pezantajn dudek *liang*-ojn la superajn moneroj, kaj la bronzaĵojn, pezantajn duon-*liang*-on la malsuperajn moneroj. La moneroj ĉifoje elterigitaj estas tre valoraj objektoj. Krome, oni trovis ankaŭ du sigelilojn malpli grandajn ol fingropinto, sur kiuj estas gravuritaj respektive la vortoj "peng zu", "tu vej". Ili estas tiel subtilaj gravuritaj kiel la nuntempaj, kaj diferencas de la lastaj nur en skribstilo.

La esploro kaj elfosado de la ĉefurbo de Kin-dinastio komencis nur sian unuan paŝon. Arkeologiaj laborantoj jam ellaboris detalan planon por pli profundaj esploro kaj elfosado.

* *liang*-o = 1/16 ĝino aŭ 1/32 kg.



El la Epoko de la Tri Regno
(220 p.K. — 280 p.K.)



14. Bildo laŭ dancista figuro elterigita ĉe Meng-gubernio.

15. Danco de la korea nacio. Vidita sur la murpentraĵo de ŝtona tombo elterigita ĉe Gi-an-gubernio, Gilin-provinco.

16. Bildo sur bronza spegulo de Okcidenta Gin-dinastio.

Landlimaj Problemoj de Ĉinio Kun Mongolio kaj Pakistano Pace Solvitaj

La historio postlasis multajn problemojn al popola Ĉinio. Unuj el ili estas la landlimaj problemoj. Inter Ĉinio kaj pluraj el ĝiaj najbaraj landoj troviĝas landlimaj problemoj. Ĉar antaŭe la landlimoj estis neniam oficiale determinitaj. Por pace solvi tiujn problemojn laŭ la Kvin Principoj de Paca Kunekzistado Ĉinio jam faris kontraktojn kun Birmo kaj Nepalo respektive.

En lasta decembro, Ĉinio plue solvis la landlimajn problemojn kun Mongolio kaj Pakistano. Je la 26-a, la Landlima Traktato inter Ĉinio kaj Mongolio estis subskribita, kaj je la 28-a, la registaroj de Ĉinio kaj Pakistano publikigis samtempe kunan komunikon pri principa interkonsento de la situo kaj liniigo de la landlimo inter Hingiang de Ĉinio

kaj la apudaj regionoj, kies defendadon respondecas Pakistano.

La landlimo inter Ĉinio kaj Mongolio longas pli ol 4,000 k.m. kaj tiu inter Ĉinio kaj Pakistano atingas centojn da k.m. Tamen surbaze de la spirito de egaleco, kooperado, reciproka komprenemo kaj reciproka akomodigo Ĉinio sukcesis solvi kun la du najbaraj landoj tiujn problemojn per intertraktado.

La Plej ŝatata Novelo

La plej ŝatata novelo en Ĉinio depost la Liberiĝo en 1949 estas *Ruĝa Roko*, verkita de Luo Guangbin kaj Jang Jijan kaj eldonita de la Ĉina Junulara Eldonejo ĉe la fino de 1961. Ĝis lasta decembro, ĝi vendiĝis jam pli ol 3,000,000 ekzempleroj kaj represiĝis pli ol 78 fojojn. La novelo temas pri heroaj bataloj de la komunistoj kaj progresemluloj kontraŭ Usono-Ĉiang-aj reakciularoj en Ĉunkino antaŭ 14 jaroj. Ĝi estas favora temo en

diskutoj kaj prelegoj en literaturaj rondoj same kiel en la vasta legantaro. Centoj da paroladoj pri ĝi estas faritaj. Plie ĝi estas jam adaptita en moderna dramo kaj en pluraj tradiciaj ĉinaj operoj.

Migrantaj Bibliotekoj en Montregionoj

Pli ol 30 migrantaj bibliotekoj funkcias nun en la montregionoj ĉirkaŭ Pekino. Ili estas funkciigataj de la produktaj grupoj en la popolaj komunumoj. Multaj kulturaj centroj en multaj gubernioj ĉirkaŭ Pekino sendis librojn, legaĵojn al la migrantaj bibliotekoj por helpi ilian funkciadon. Laŭ enketo, libroj pri scienco kaj tekniko, gazetoj, eldonaĵoj pri politikaj aferoj kaj revoluciaj rakontoj, kaj klasikaj literaturaj verkoj kiaj *Ĉe la Akvo-rando* priskribanta kampanan leviĝon kaj *La Tri Regno*j fama historia romano estas vaste ŝatataj de kamparaj legantoj.



17. Bildo laŭ porcelana ornamajo de grenujo elterigita ĉe Ĵujan, Ĝegiang-provinco.



18. Kopio de fresko ĉe Dunhuang.




Daŭrigo en la sekvanta numero

LA KAJTO


LA kajto estas unu el la plej antikvaj ludiloj. En sia verko *La Ĉiopova Homaro* H. W. Van Loon skribis interalie: “. . . laŭ libro de la ĉina historio, antaŭ kvar mil jaroj oni jam ludis per kajtoj.” Ŝajnas ke la dirita tempo estas tro frua, ĉar la koncernaj notoj unue aperis en Ĉinio antaŭ pli ol du mil jaroj. Oni skribis ke “Mozi sukcesis fari en 3 jaroj lignan birdon (kajton), kiu povis flugi.” kaj “Gonŝu Ban faris lignan birdon, kiun li sendis por gvati la urbon de Song-regno.” Tiam la kajtoj estis faritaj el maldikaj lignopecoj. En la postaj tempoj troviĝis alia noto ke ankaŭ generalo Han Hin de Han-Dinastio (206 a. K. — 8 p. K.) utiligis en milito paperajn kajtojn kaj oni eĉ prenis Han Hin kiel la inventinton de la papera kajto. Se tiu ĉi aserto estas vera, la kajtoj kiujn uzis Han Hin, povus esti faritaj el tafto, ĉar tiam papero ankoraŭ ne estis inventita. En la okcidento estas diroj ke la papera kajto estis inventita de la amiko de Plato en la jaro 400 a. K. Sed estis multe da alilandanoj, kiuj kredis ke kajto devenis de Ĉinio kaj nur poste diskoniĝis en Eŭropo.

La papera kajto ordinare estas farita el malpeza bambua skeleto, kiun oni glue kovris per papero aŭ tafto. Ĝiaj figuroj ĝenerale

Hirundo-kajto



similas al tiaj belaj birdoj, insektoj, fiŝoj k.t.p., kiaj sovaĝansero, fenikso, papilio, skolopendro, orfiŝo, belulino, stelo, luno ktp. Sur la papero estis aldonitaj tre ĉarmaj koloroj. Kajtoj, faritaj de lertaj manoj, estas ne nur facile leveblaj por vento, sed ankaŭ kun vivecaj formoj kaj belegaj koloroj. Oni aprezas ilin kiel artaĵojn. Kaj oni ofte alligas sur ilia kapo bambuan fajfilon aŭ kordon, kiu bele sonoras en vento, simile al liuto, tial en Ĉinio oni alinomas la kajton “ventoliuto” kiu ne nur tre plaĉas al infanoj, sed ankaŭ



Papilio-kajto

interesas la plenkreskulojn. En ĉinaj antikvaj libroj troviĝas jena priskribo: En la tempo de la Dinastio Norda Song, la ĵus kronita imperiestro Ĝaŭ Gi (1101-1125 p. K.) iutage ludis per papera kajto. La kajto hazarde falis en korton de iu regnano, kaj tion oni informis al la ministro Zeng Bu. En la sekvinta kortega aŭdienco la lasta demandis al Ĝaŭ Gi pri la okazintaĵo. La imperiestro haste neis dirante ke nenio simila okazis kaj tio, kion aludis la ministro, estis nur misinformo. Tio montris ke eĉ Ĝaŭ Gi, la imperiestro, ne povis sin deteni de



Hu Ginggu, kajtofaristo eklerninta tiun metiarton en sia 13-a jaro kaj kun sperto de 59 jaroj, provas flugigi sian novan kajton.

Foto de Sun Ging

la interesa ludo kaj sekrete ludis kajton en la palaco. Sed li hontis konfesi pri tio, ke li, jam plenkreskulo, ankoraŭ ludas per infana ludilo.

Kvankam la kajto estas ludilo bagatela, sed dum militoj, kiam la situacio fariĝis urĝa, oni ekpensis ankaŭ pri la kajto. Laŭ la supre menciitaj notoj, ĝia deveno iel rilatis kun militoj. En aliaj okazoj laŭ historiaj verkoj kajtoj estis uzitaj por urĝaj helpopetoj. Ekzemple kiam Hiaŭ Jan (517-549 p.K.), la imperiestro de Liang-regno, estis sieĝata de la ribela generalo Hou Ĝing en la urbo Taj, li ligis leteron al kajto kaj ĝin sendis por peti helpan armeon. Estas malfacile imageble por la ordinaraj ludantoj de kajto ke la infana ludilo povas esti utiligita en servo al milito.

La kajto ne nur ludis rolon en militoj, sed ankaŭ en scienca esplorado. Laŭ historiaj notoj, multaj modernaj sciencistoj utiligis kajtojn en siaj eksperimentoj. Ekzemple en 1749, la angla astronomo Alexandria Wilson ko-

mencis esplori la temperaturon de la alta tavolo atmosfera per termometro, kiu estis kunportita de kajto en la ĉielon. La 10-an de junio, 1752, estis fulmotondra tago, la 46-jara Benjamin Franklin, kunportanta kajton iris al la kamparo kune kun siaj infanoj por tie ĝin flugigi, kaj la rezulto konfirmis lian hipotezon ke la fulmo estas elektra fenomeno, nome malŝargo de elektro en nuboj. Tiu ĉi elektrisma eksperimento malkovris la sekreton de elektro kaj malkovris la veran fizionomion de Tondrodio. Depost tiam rakonto pri la kajtflugigo de Franklin fariĝis anekdoto senmorta kaj en Usono oni eĉ faris sur metala monero reliefan bildon de la kajtflugigo. La 12-an de dec., 1911, Guglielmo Marconi unuafoje elsendis sian transatlantikan radiogramon de Cornwall en Anglio al Newfoundland, sed tiutage lin trafis ŝtormo, kaj la anteno de la radiosendilo estis



Skolopendro-kajto farita de Hu Gingĝu

Foto de Sun Ging

difektita. Nur dank' al kajto li fine sukcesis en sia provo.

Krome, kajto eĉ solvis ankaŭ malfacilojn por homoj en praktiko. Laŭdire la fama pendponto de Klifton en Anglio estas 702

futojn longa kaj 31 futojn larĝa, kaj ĝi estas pli ol 200 futojn alta super la rivero Avon. Per kio do oni portis la ŝtalajn ŝnuregojn trans la riveron dum la konstruado de la ponto? Kajto! Jes, kajto!

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Delegitoj por Paco kaj Amikeco Varme Bonvenigitaj en Ĉinio

Tuj antaŭ kaj post la novjara festo ĉijare venis sinsekve al Ĉinio du honoraj gastoj. Unu el ili estas S-ino Sirimavo Bandaranaike, ĉefministrino de Cejlono, kaj la alia, D-ro Subandrio, vicĉefministro de Indonezio. Ili alportis la amikecon de la popoloj de Cejlono kaj Indonezio al la ĉina popolo kaj samtempe pacajn proponojn de la Seslanda Kolomba Konferenco por akceli rektan intertraktadon inter Ĉinio kaj Hindio por paca solvo de la ĉini-hindia landlima problemo.

Ilia alveno, precipe tiu de ĉefministrino S. Bandaranaike kiu la unuafoje honoris Ĉinion, estis varme bonvenigita de la tuta ĉina popolo. Ĉe la aerodromo, apud la

stratoj, kiujn ili trapasis, centmiloj da pekinanoj bonvenigis ilin, kiam ili atingis nian ĉefurbon.

La gvidantoj de nia registaro aranĝis por ili specialajn akceptojn kaj bankedojn. Iliaj senlacaĵaj laboroj por la paco kaj solidareco de la aziaj kaj afrikaj landoj estas alte taksitaj. Ĉe la fino de ilia vizito estis publikigitaj Komunikoj Ĉini-Cejlona kaj Ĉini-Indonezia respektive. La komunikoj montras, ke niaj honoraj gastoj varme aprobas la unuflankajn pafĉesigon kaj retiriĝon de trupoj de ĉini-hindia landlimo fare de la ĉina flanko kaj ke la iniciativo de la Cejlona Registaro estas dankinda kaj la klopodado de la Seslanda Kolomba Konferenco, alte taksita. Al la proponoj de ili alportitaj, la Ĉina Registaro faris pozitivan respondon.

La komunikoj montras plue, ke ilia vizito multe helpas al la amikeco kaj kunlaborado de Ĉinio kun la du landoj.

Pli da Traktoroj por la Nord-oriento

Pli ol 6,000 novaj traktoroj estas senditaj en 1962 al Liaŭning, Hejlonggiang kaj Gilin, la tri nord-orientaj provincoj. Plejparto el ili estas sendita al traktor-stacioj por servi la popolajn komunumojn, kaj la alia parto al ŝtataj farmoj. Nun la totala nombro de traktoroj en tiuj 3 provincoj atingis 28,000. En la grandaj ŝtataj farmoj 60-70% el la laboroj estas faritaj mekanike, kaj en la popolaj komunumoj, la traktoroj estas uzataj ĉefe en plugado, draŝado kaj transportado.

Esperanto Marŝas

ANKORAŬ PRI Z-A FESTO

Post presiĝo de la lasta numero ni ricevis plie informojn pri la Zamenhofa Festo en Vu-han kaj Ĝengĝou, la ĉefurboj de Hubej-kaj Henan-provincoj respektive. Esperantistoj en ambaŭ lokoj okazigis festan kunsidon. En la kunsidoj, krom la festaj programeroj kiujn ili faris, ili ankaŭ sin ekzercis esperantan interparolon, aŭ diskutis pri problemoj de la loka E-movado.

Zamenhoffesto en Ĝengĝou



EL MOSKVO

Komisiono pri Esp-aj Aferoj —

En lasta aŭtuno organiziĝis en la Domo de Amikeco en Moskvo

Zamenhoffesto en Vuhan



konstanta komisiono pri Esperantaj Aferoj. K-do R. Saakov ĝin estras, kaj kiel salajrata oficistino tie deĵoras k-dino I. Varvanina. Ĝia adreso: Moskvo, ul. Kalinina, 16, Centra Domo de Amikeco, USSR.

Ĉini-Sovetia Amikeco — Je la 30-a de lasta sept. en Moskvo estis aranĝita vespero dediĉita al la 13a Nacifesto de la Ĉina Popola Respubliko. Riĉenhavan kaj kompletan raporton pri la ĉina revolucio faris k-do D-ro K. Laavrentjev. Li varme substrekis la firman ĉini-sovetian amikecon kaj bonan agadon de Ĉina Esperanto-Ligo. Fine li proponis sendi al ĉinaj gesamideanoj koran gratulon pro la solena dato kaj la profundajn bondezirojn de la ĉeestintoj.

Ĉe la fino oni donis multajn informojn pri la E-movado.

Bulgari-Sovetia Amikeco — Vespero dediĉita al la 18-jara datreveno de la liberiĝo de Bulgario el sub faŝisma regado estas aranĝita je la 9-a de lasta sept. Ĉeestis krom la moskvaj kamaradoj, geesperantistoj el Bulgario, G.D.R., Vjetnamio, Polio kaj Anglio. K-do Veselin Georgiev (el Bulgario) rakontis pri la historio kaj heroa batalo de la bulgara popolo kontraŭ la turka jugo, same en la lasta milito.

La propono de k-do N. Rytjkov sendi salutan leteron al Bulgara Esperanta Asocio estis aprobita.

Kaj k-do Nguen Van Kinh, vjetnama ambasadoro en U.S.S.R. salutis la grandajn sukcesojn de esperanta movado en la roza lando kaj proponis amasan partoprenon al la 48a U.K. okazonta en Sofio en 1963.

Germani-Sovetia Amikeco — La 13-jara datreveno de la fondiĝo de la Germana Demokratia Respubliko estis solenata je la 7-a de lasta okt. en Moskvo. Raporton pri kontakto kun germanaj esperantistoj faris k-do N. Rytjkov.

Novaj E-kursoj — En lasta okt. komenciĝis sinsekve elementaj kursoj de Esp. en Esp-sekcio ĉe Kulturdomo de Medicinistoj kaj en Centra Urba Domo de Instruistoj. Al la unua kurso partoprenis 21 gelernantoj kaj al la dua, 15 gelernantoj.

Laŭ informo de
Teodoro Kulagin.

(Moskvo).

ESP-KLUBO EN SIBERIO

En granda siberia urbo Omsk de Sovetio estas fondita Esperanto-klubo. La klubanoj havas viglan korespondadon kun alilandaj amikoj. Plivastan kontakton kun esperantistoj ili deziras. Poŝta adreso de la klubo: Omsk, P. K. 155, USSR.

E-Ekspozicio en Ĉeĥoslovakio

Esperanta Rondeto AMIKECO, entreprena klubo de fervojistoj en urbo Česká Trébová, Ĉeĥoslovakio tre vigle agadas. La membroj korespondas kun esperantistoj en 35 landoj. En lasta septembro ĝi aranĝis sian duan E-ekspozicion, en kiu troviĝis korespondadoj de la klubanoj kun eksterlandaj amikoj, diversaj gazetoj, donacoj ktp. Post la ekspozicio organiziĝis nova E-kurso por 20 komencantoj.



Paska Kultura Semajno en Francio

Sub la aŭspicio de la Franca Ministerio pri Edukado okazos de la 1-a ĝis la 7-a de aprilo en la Kastelo de Grésillon, Baugé, (Maine et Loire) Francujo, kultura semajno.

Prelegos: D-ro Ivo Lapenna pri *Fundamentoj de la publika parolarto kaj Formiĝo de grandaj*

komunaj lingvoj. D-ro Albault el Toulouse, Inĝeniero Michling el Gottingen, kaj diversaj konsilantoj de U.E.F. pri diversaj temoj.

50 geseminarianoj, estontaj geinstruistoj, partoprenos tiun semajnon.

Esperanta Kurso en Mozambika Ĵurnalo

Mozambikaj esp-istoj sukcesis aranĝi la publikigon en la ĉiu-

taga ĵurnalo "A Tribuna" de kurso de Esperanto kaj Esp. rubriko. Tiu entrepreno estas tre grava por la Esp. movado en Mozambiko. Tutmondaj s-anoj, bv. sendi al redakcio de "A Tribuna", caixa postal 1822, Lourenco Marques, Mozambiko, aplaŭdojn pro ilia laŭdinda sinteno favore al Esp. kaj por kuraĝigi ilin daŭrigi ilian helpon al disvastigo de Esp. en tiu lando.

Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko

HEMB estas instituto pri interlingvistiko kaj internacia lingvo Esperanto. Ĝia celo estas:

1. kolekti materialon pri mondhelplingvaj provoj, pri dokumentoj presitaj kaj nepresitaj de la internacilingva laboro. Dokumente pruvi la disvastiĝon de Esperanto en la tuta mondo, montri ĝian praktikan uzon, rolon en la originala kaj tradukita beletristiko, sur la kampo de sciencoj kaj ĝenerale en la ĉiutaga vivo de la homaro;

2. konservi la kolektitan materialon por la venontaj tempoj kaj zorgi pri ĝia alirebleco por scienculoj, esploristoj, interesuloj;

3. bibliografian laboron fari rilate al la interlingvistiko kaj Esperanto;

4. per ekspoziciaj aranĝoj dokumenti, ilustrati la novajn aplikojn kaj rezultojn de Esperanto por la vizitantoj (neesperantistaj) de Somogyi-Biblioteko, en kies kadro HEMB funkcias. Samtempe helpi per materialo la aranĝojn de dokument-ekspozicioj rilate al Esperanto.

Jam en 1912, hungara esperantisto s-ano A. H. Marich skribis pri bezono de Esperanto-Muzeo

pro granda disvastiĝo de nia movado. Kaj dum multaj jaroj li laboris por ĝi. Diversajn dokumentojn pri la mondlingvo li kolektis.

Bedaŭrinde, la materialo de s-ano Marich kaj post du jardekoj la nova kolekto de s-ano D-ro J. Takács tute pereis dum la mondmilitoj.

La nuna HEMB estas fondita de Prof. Ernő Farkas. Dum ĝia dujara ekzisto miloj kaj miloj vizitis la novan instituton. Nur dum 1962 pli ol 650 eksterlandaj s-anoj vizitis ĝin. Sed multe pli grava estas la vizitnombro de la ne-esperantistoj, nome HEMB funkcias en la kadro de la tre vizitata Somogyi-Biblioteko. Do ĝia ekzisto tre efikas kaj havas influon por la popolamasoj.

En la legoĉambro oni povas legi 14 diversajn Esperanto-revuojn. La biblioteka bindejo bindas jar-

fine la kompletajn jarkolektojn.

La materialo de HEMB kreskas dank' al la solidareco de la tutmonda esperantistaro, kiu pruvas ne nur la vivkapablon, sed ankaŭ la valoran energifonton de nia movado.

Krom la regula funkciado ĝi ankaŭ eldonis 3 diversajn kovertojn kaj leterpaperojn, 2 p. kartojn, 3 glumarkojn kun Esperantotekstoj kaj okaze de la inaŭguro en 1961 hungarlingvajn afiŝon kaj invitilon. Kaj en 1963 ĝi eldonos katalogon de la muzeo.

HEMB





SUR NIA LIBROBRETO

H. C. Andersen: **LA MARVIRINETO** — Tradukita el la dana originalo de Ib. Schleicher. Bindita, 27 × 21 cm., 75 paĝoj inkluzive de 20 koloraj kaj 8 nigraj tutpaĝaj ilustraĵoj. Eld. KOKO. Prezo 15.- d. kr. aŭ 30 steloj.

La belan fabelon de H. C. Andersen pri la mara virineto mi jam legis plurajn fojojn en diversaj tradukoj, tamen la nova traduko de Ib. Schleicher alportis al mi plian plezuron. Ĝi ne nur ĉarmas per sia luksa vesto, sed ankaŭ alportis al mi la eblecon pliprosimiĝi al la originalo. Oni motivigis la eldonon de la nova traduko per kvar kaŭzoj: 1-e, la Zamenhofa traduko estas ne plu aĉetebla; 2-e, la Zamenhofa traduko estas farita el la germana; 3-e, la ilustraĵoj estas havendaj; 4-e, la tradukinto posedas neordinarajn spertojn verki precipe por infanoj. Tiu ĉi entrepreno de KOKO ja meritas laŭdon.

Estas superflue fari prezenton pri la mondfama verkisto H. C. Andersen aŭ la enhavo de la fabelo. Do mi nur diru kelkajn vortojn pri la lingvaĵo de la nova esperanta traduko. Komparinte la novan tradukon kun tiu de D-ro L. L. Zamenhof, mi trovis, ke ili diferencas unu de la alia je pluraj lokoj. Plua komparo kun la ĉina traduko, kiun faris s-ano Cicio Mar laŭ la dana originalo, montris al mi, ke la interpreto de Ib. Schleicher estas pli fidela al la originalo, kvankam en multaj lokoj la Zamenhofa traduko estas pli bonstila kaj pli bela. Se oni estus kritikema, eble oni proponus anstataŭigi la kursivajn vortojn en la sekvantaj frazoj per tiuj en la parentezoj:

P. 5 L. 9 — kvazaŭ ili estus vivaj (kvazaŭ ili estus vivaj estaĵoj);

L. 1 demalsupre — Unu sola estus vera beligajo en krono de reĝino (. . . el kiuj ĉiu sola);

P. 6 L. 3 — *dekdu* (dek du);

L. 6 — la filinojn de ŝia (sia) filo;

L. 13 — same kiel ĉe ni la hirundoj enflugas, kiam ni *malfermas* (malfermas la fenestron);

P. 9 L. 13 — knabo . . . hakita el *la* (ĉi tiu “la” estas superflua) blanka klara ŝtono;

L. 24 — la fiŝoj . . . povas kanti tiel . . . rave, ke estas vera plezuro (prezuro ilin aŭdi);

P. 14 L. 5 — la grandaj balenfiŝoj ŝprucigis akvon el siaj naztruoj *tiel, ke aspektis kiel centoj da fontanoj ĉirkaŭe* (kvazaŭ centoj da fontanoj estus ĉirkaŭe);

P. 22 L. 2 — *se ne la marvirineto estus alveninta* (la marvirineto ne estus alveninta);

L. 3 demalsupre — *neniu* povas vidi (neniu);

P. 24 L. 9 — demandi *de* ŝi (al);

L. 2 demalsupre — ili leviĝis . . . antaŭ la loko, *kie ili sciis, ke troviĝas* la palaco de la princo (kie, ili sciis, troviĝis);

P. 31 L. 4 demalsupre — Efektive estis luksa beleco, *kiel* (kian) oni neniam vidis sur la tero;

P. 32 L. 5 demalsupre — *neniu* floroj (neniu floro, aŭ nenia floro);

P. 35 L. 2 demalsupre — ŝi . . . lasis ilin *movaci* (sin movaci) sur *sia* (t. e. tiu de la akvokolubroj! Ĉu oni ne devus ĝin anstataŭigi per “ŝia”?) granda spongeca brusto.

Por esti justa oni devas diri, ke la lingvo de la traduko estas ĝenerale facila kaj bonstila. Tiu ĉi bela libro estas vere havinda por ĉiuj, kaj precipe por la geknaboj.

V. K.

Ĉeĥaj Fabeloj — Libere rakontis Valdemar Vinař en Esperanto kaj eldonis la Amo-akademio en Japanio. Krom la bela kovrilo aldonitaj estas kvin plurkoloraj tre plaĉaj ilustraĵoj de Josef Lada algluitaj sur blankaj paĝoj. La formato (13 × 19 cm.) kaj la

aranĝo estas tute samaj kiel tiuj de ĝia antaŭiranto *Japanaj Fabeloj*. P. 74. Prezo: 0.50 \$US aŭ egala valoro. Mendebila ĉe la eldonejo (adr: AMO-AKADEMIO, Tenmori, Kozoji, Aiĉi-ken, Japanio) aŭ ĉe la Japana Esperanto-Instituto.

Ĉe la unua rigardo mi estis tre mirigita, ke el Japanio venas *Ĉeĥaj Fabeloj*. Sed leginte la rimarkon de la eldoninto sur la kovrila faldo, mi ekkomprenis kaj laŭdis la ambicion de la eldoninto, ke li volas eldoni fabelaron el la tuta mondo por tutmondaj infanoj. Tiu ĉi volumo do estas la dua el tiu granda serio. Mi esperas, ke venos post ne tre longa tempo la sekvontaj.

En tiu ĉi volumo la rerakontinto zorge selektis ses ĉeĥajn fabelojn laŭ li la plej karakterizajn. Traleginte la tutan libron oni povas tion kredi. Ili estas tiel belaj kaj allogaj, ke ilin finleginte oni deziras plian tian trezoron.

Mirinda estas la simpleco kaj viveco de la lingvo. Ne troviĝas longaj pezaj frazoj en la tuta libro; apenaŭ renkonteblaj la maloftaj vortoj, des malpli la ŝokaj neologismoj, kiujn la pedantuloj tiom ŝatas. Por tio certe la rerakontinto kaj la reviziinto pagis grandan laboron. Presaroj estas malmultaj. Indas esti citataj nur la jenaj: “edzino” anstataŭ “edzo” (p. 21, linio 9), “per laboradi” anstataŭ “perlaboradi” (p. 21, linio 3 demalsupre), “maljunuleto” anstataŭ “maljunuleto” (p. 29, linio 13). Diskutinda estas la uzo de mallonga sed ankaŭ neofte uzata vorto kia “aŭtenta” anstataŭ “aŭtentika” en tia libro.

Libro rekomendinda ne nur al la infanoj sed same al la komentantoj kaj plenkreskuloj.

H. F.

K. O. Schmidt: **Legu kaj Ridu** (Gajiga Esperanto-Legolibro) — Libreto de humoraj legajetoj. Ĝi enhavas jenajn ses partojn: ŝerĉoj, spritaĵoj, amuzajetoj, niaj etuloj, malicaĵoj kaj groteskaĵoj. Kiel la enhavo montras, ĝi taŭgas por

komencantoj kiel kroma kaj amuza legaĵo. Laŭ rimarko en la libreto la lingvo estas aprobata de la Lingva Sekcio de GEA. Tamen

en kelkaj lokoj la teksto ŝajnas bezoni ankoraŭ plian poluradon. Ekzemple tuj en la unua frazo de la antaŭparolo oni trovas jenan

esprimon: "La ĉi sekvanta kolekto. . .". 12 × 16.5 cm., 88 paĝoj. Prezo neindikita.

H.



Skribas

Niaj Legantoj

Mi kvazaŭ povas travivi kun vi

Jam de longa tempo ĝojigis min la regula ricevado de via revuo "El Popola Ĉinio".

El profunda koro mi dankas al vi, karaj geamikoj, por la afableco havigi al mi kaj al miaj amikoj aŭstriaĵoj ĉi tiun interesan revuon. Tiamaniere mi kvazaŭ povas travivi kun vi la seriozajn klopodojn en la batalo je la libereco kaj pasia gardo de la paco je la bono de la popoloj kaj mi ĝojas ankaŭ kun vi pri ĉiu sukceso. Ni interkonatiĝas tiamaniere kun popolo malproksima kiu heroe kaj persiste detruis la jugon de la kolonialismo kaj nun marŝas libere antaŭen sub la gvidado de la granda prezidanto Maŭ Zedong, pri kies batalo kaj vivo mi legis en la libro ricevita antaŭ kelkaj tagoj.

W. Franz, Aŭstrio

Lukto honorigas

Ekde mia infaneco (nun mi estas maljuna) mi estas ensorĉita en ĉina popolo kaj ilia lando. Ĝis nun, malmulte mi konas pri Ĉinio, escepte pere de legado de gazetoj.

Post ses monatoj da lernado de Esperanto mi povis legi fremdlandajn Esp. gazetojn, inter kiuj solan numeron de via "El Popola Ĉinio", kiu multe plaĉis al mi. Tiel oni vidas, ke la materia kreskado de Ĉinio estas grandega.

En mia lando mi kutimas aŭdi multajn sentencojn pri ĉina saĝeco, kaj mi rememoras ke miaj antaŭuloj kaj samtempuloj diras, ke Brazilo kaj Ĉinio similas unu al la alia — du vastegaj landoj kun tiom da problemoj.

Iam, brazila poeto skribis: La lukto, miaj filoj, al la fortuloj honorigas, al la malfortuloj senkuragiĝas. Antaŭen!

S. de P. Quieroz, Brazilo

"Nia gazeto"

Jam de komenco mi estas leganto de via revuo "El Popola Ĉinio". Dank' al ĝi viaj lando kaj popolo fariĝis al mi tre proksimaj. Kvankam de kelkaj jaroj mi povas legi pri via lando ankaŭ en pollingva revuo "Ĉinio", tamen tiun ĉi revuon mi ne legas kun tiom da intereso kaj scivolemo kiel la ŝatatan "El Popola Ĉinio". Ĝi havas jam sian tradicion kaj ni ŝatas diri pri ĝi: "nia gazeto". Ŝajnas al mi, ke kiel ĝiaj longjaraj legantoj ni rajtas tion, ĉu ne?

Z. Glajcar, Pollando

Neologismoj kaj specifaj vortoj

Mi ankaŭ deziras turni atenton al la uzado de la novaj kaj specifaj vortoj en la redaktado de la revuo. Laŭ mi bona revuo populara devas esti bone redaktita en simpla populara, facile kom-

prenebla por la vasta legantaro lingvo. La uzado de neologismoj kaj specifaj vortoj devas esti tre limigita kaj praktikata nur ĉe ekstremaj okazoj.

Sur la paĝoj de "El Popola Ĉinio" ofte la uzataj neologismoj kaj specifaj vortoj estas interpretataj, sed ankaŭ estas okazoj kiam tio ne estas farata kaj tiam oni ne povas kun plezuro kaj utile legi la koncernan artikolon.

Mi opinias, ke, uzante specifan vorton oni devas ĝin klarigi, se ĝi aperas unuan fojon en la kuranta jaro kaj ĉiam menciigi la lokon kie ĝi aperis unuan fojon en la jaro. Rilate la neologismojn oni devas esti tre ŝparema kaj ankaŭ ilin bone klarigi.

Ekzemple al mi fortan impreson faris la neologismoj: beninkaso, aprezi, lagenario, kiujn mi trovis en neniu Esperanta vortaro. Mi opinias, ke oni povas forigi tiujn mankojn kaj fari la revuon ankoraŭ pli facile atingebla por la vasta legantaro.

I. Andreev, Bulgario

Tute absorbata

La 6-a numero de la revuo "El Popola Ĉinio", kiel kutime, tre ĝojigis min kaj miajn samideanojn kaj ankaŭ vekis intereson inter multaj gekunuloj. Mi devas diri, ke la artikolo verkita de Fongĝang "Ĉe Ponto de Rivereto" tre ravis min. Dum la legado de ĝi mi sentis ke mi estis inter la klientoj de la tetrinkejo "Si Haj Ĉun" kaj atente aŭskultis al la babilado dum mi estis trinkanta kruĉeton da bone infuzita kaj bonodora teo. Efektive, eĉ pli ol mi vorte povas sufiĉe bone klarigi al vi, mi estis tute absorbata.

J. R. Miller, Anglio

* **Maria Pruchniewicz**, Zielona Ĉora, Banc Inwestycyjny, Polando, kun ĉl. filatelistoj k interŝ. kompletajn nestampitajn pm-seriojn (faŭno, floro, sporto, arto).

* **Jan Hubregtse** (40-j. oficisto), Den Haag, 5, Zusterstraat 22, Nederlando, serĉas seriozajn, lingvosciajn gekorespondantojn en Afriko, Azio, Usono k Latin-Ameriko k kor. pri ĉt. vere interesaj.

* Bonvolu noti **novan adreson de Deorgo Deŝkin**: p/o Kuzjmino, —Gatj, Tambovskoj oblasti i rajona, USSR.

* S-ro **Vasil D. Velĉev** k s-ro **Hristo Terzijski**, du studentoj el Bulgario, str. Otee Paisij no. 87, Sofio-3, dez. kor. kun gejunuloj el ĉl, precipe: Japanio, Ĉinio, USA k arabaj landoj.

NI BEZONAS VIAN HELPON

La subskribinto sukcesis interesigi pri Esp. urban konsilanton de Villecresnes (Seine & Oise), Francio, urbeto apud Parizo. Tiu konsilanto rezervigis terpecon en ĝardeno de infanlernejo por planti florojn k plantojn el la tuta mondo.

Ni dez. ricevi tipajn plantojn aŭ semojn el la via lando kun klarigoj pri la flegmaniero, datoj de plantado, de florado, ktp.

Kompense la urbo sendos rozplantojn famkonatajn kiel "Brie".

Ni antaŭdankas ĉiujn, kiuj ebligas al ni montri praktike la utilecon de Esp. por internaciaj rilatoj.

J. A. Rousseau
kasisto de U. E. F.
34, rue de Chabrol
Paris 10^e

* **Bartulec Paŭlo**, Stonava 100, Silezio, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. k interŝ. per leteroj, ipk kun esp-istoj el Ĉinio, Japanio, Koreio, Vjetnamio, Hindio, Indonezio, Kamboĝo. Certa respondo.

* **Polsemen E. V.**, USSR Sverdlovsk 40, Krasnoflotcev 7 kv. 11, interesiĝas pri Esp. kiel lingvistiko-pedagogia fenomeno k aliaj temoj, interŝ. esp. librojn k gazetojn. Nepre respondos.

* **Asoko Gunawardhana**, 10 Pendennis Avenue, Colombo 3, Ĉeĥlono (Ceylon) dez. interŝ. alumetetiketojn k pm kun ĉl.

* **Friedrich Gotre Altonburg** (Bez Leipzig) Fr. Engelsstr. 14 III, Germanio DDR, dez. kor. kun orientaj landoj, Bulgario, Svedio. USSR k afrikaj landoj pri ĉt.

* F-ino **Maria Laleva**, 18j. str. Nikola Vojnovski N 154, Gabrovo, Bulgario, kun ĉl.

* **Esp. rondeto "Verda Stelo"** dez. kor. kun ĉl pri ĉt kaj interŝ. bk k fotojn. Anoj 20-25j. Adr: USSR, Tula 1 Krasnij perenlok, 9, Kiselev S. A.

* **James Townley**, Kilgour Str., Seacliff, Otago, Nov-Zelando, (ĉefĝardenisto) dez. kor. kun Ĉinio, Koreio, Vjetnamio k Japanio pri pacmovado, esp. agado, moroj k kutimoj, ĝardenkulturo.

* **Esp. propagandan ekspozicion kaj leter-vesperon** ni aranĝos en aprilo, 1963. Ĉiulandaj ges-anoj bonvolu sendi interesajn, il. bele afr. bk. aŭ leterojn, pm, fotojn, presajojn, lernolibrojn, kantaretojn, k aliajn propag. materialojn. Viaj gratuloj helpas propag. por-esp. laboron en unua pola ĝeneral-kleriga liceo, kie 4 plenaj kursoj lernas Esp. dum normala horaro, malgraŭ multaj obstakloj kaj ĝenoj de kontraŭantoj de Esp. 120 geesp-istoj 15-18 jaraj kun 5 geprofesoroj dez. kor. tutmonde. Resp. certa. **Mag. Maria J. Kraŭsowa**, Sosnowiec. Skr. poczt. 48, Pollando.

Dumonata Gazeto Eldonata de la Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Adm.: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 2 (79) 1963

Bildo sur la kovrilo: Traktoristino
(Foto de He Ŝijaŭ)

Ĉies Opinio Dezirata

Projektado de Novtipaj Ŝpintek-sejoj

Vojaĝnotoj pri Malio

En Besto-hospitalo

Surmaraj "Kampoĵ"

Ĝang Juĝe kaj Asteroidoj

Terkulturisto

Olunĉunoj — Nomado Nun Fikslo-ĝanta

Kantoj el la Riversudo

Plena Ekspozicio de Vero

Pensad' pri Kubo Malproksima

La Popola Komunumo Forigis la Minacon de Granda Dezerto

Bruligu Bivakfajron Nian

Senvelkaj Floroj

Bildoj pri Antikvaj Dancoj de Ĉinio

La Elfosado de Ĉefurbo Hianjang de Kin-dinastio

La Kajto

Esperanto Marŝas

Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko

Sur Nia Libroreto

Skribas Niaj Legantoj

Korespondi Deziras

Bildo sur la Dorskovrilo:

Printempo
(Foto de Ĵen Ŝijin)

Julong-monto

Ĝardeno de Floroj

Julong-monto estas metita sub specialan protektadon laŭ ordono de la ŝtato kaj esplorado pri la sovaĝaj floroj kaj drogplantoj estas farata de sciencaj laborantoj.

1. Pekina Eŭforbio
2. Roskoeo (Roscoea)
3. Stelero (stellera *Chamaejasme* L.)
4. Inkarvileo (*Incarvillea Sinensis* Lam.)
5. Sovaga rozc

